

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPEN
PROPAGANDA
E
PORESPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHE STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSTRAAT 51

4^A JARO

N^o 1

JANUARO 1928

JARA ABONO
UNU NUMERO

BELGUJO : 3.— Bfr.
0.30 Bfr.

EKSTERLANDO 1.25 Sfr.
0.15 Sfr.

Al niaj estimataj gelegantoj ni deziras multan feliĉon dum la jaro 1928.

A.P.P.K.

Al la abonantoj de nia Bulteno.

La abonantoj de nia Bulteno estas ĝentile petataj pagi kiel eble plej baldaŭ sian abonon al la administranto, S-ro J. Swalf, August Sniedersstraat, 51, Antwerpen.

Jarkunveno de A.P.P.K.

La jarkunveno de A.P.P.K. okazos ĵaŭdon, la 19an de januaro, je la 8a vespere, en la sidejo "Centraal Schouwburg".

Statutoj de la "Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato".

Por ke ĉiu ano de la grupoj aliĝintaj al A.P.P.K. bone konu kaj komprenu ĝian celon kaj agadon ni opinias ke estas utila publikigi la statutojn de A.P.P.K.

ART. 1. La sidejo de A.P.P.K., komitato de Esperantistaj grupoj, starigita la 22an de julio 1924, estas en Antwerpeno.

2. La komitato celas :

a) la disvastigon de la mondhelplingvo Esperanto ĝenerale ;

b) speciale la oficialan enkondukon en la Publika instruado.

3. La komitato klopodas atingi sian celon per :

a) la disvastigo de propagandiloj pri Esperanto kaj la e'dono de ekskluziva poresperanto bulteno ;

b) la aranĝo de poresperanto propagandkunvenoj ;

c) la organizo de kursoj pri Esperanto en lokoj kie ne ekzistas Esperantistaj grupoj ĝis ĝia oficiala enkonduko en la lernejoj ;

d) la interrilatoj kun ekster- kaj enlandaj samcelaj organizaĵoj.

4. La komitato konsistas el :

a) grupoj kies per regularo fiksita celo estas la disvastigo de Esperanto ;

b) subtenantoj.

5. La aliĝintaj grupoj restas memstaraj en sia interna organizo kaj loka movado kaj en ĉio, kio ne estas fiksita per la statutoj. Ili ne rajtas aranĝi kursojn dum funcias la oficialaj escepte en la okazoj aprobotaj de la ĝenerala kunveno. Ili nur limiĝas je la varbado de lernantoj por la oficialaj kursoj.
6. Eksmembrigon decidas la ĝenerala kunveno pro :
 - a) agoj kiuj celas difekti la Esperantan movadon ;
 - b) karakterŝanĝo de grupo, per kio ĝi ĉesus esti Esperantopropaganda grupo ;
 - c) la ne plenumo de financaj devoj.
7. La estraro konsistas almenaŭ el kvin membroj : prezidanto, vic. prezidanto, sekretario, bibliotekisto, kasisto. La elektado okazas ĉiujare.
8. Ĉiu aliĝinta grupo rajtas nomi tri delegitojn, el kiu la estraro estos elektata. La estrarŝanĝo okazos tuj post la elektado de nova estraro.
9. La enspezoj de la komitato konsistas el : kotizoj de la grupoj kaj subtenantoj, subvencioj, hazardaj profitoj, k.t.p. La jara kotizo por grupoj estas minimume Frs. 25. —. Subtenantoj pagos minimume Frs. 10. — jare, pagebla duonjare.
10. La komitato kunvenas :
 - 1^o) en jarkunveno, kiu okazos en januaro ;
 - 2^o) en ĝenerala kunveno, la trian jaŭdon de ĉiu monato. Ĉiusemajne okazos interparoladvespero en la sidejo. La estraro rajtas kunvoki eksterordinaran kunvenon.

La jarkunveno pritraktos unualoke la jarraportojn : poste la punktojn, kiujn la komitatestraro kaj grupoj metigis sur la tagordon, kaj la agadon por la venonta jaro.

Ĉiuj gravaj punktoj pritraktataj en ĝenerala kaj jarkunveno estas privoĉdonotaj. Nur la grupaj delegitoj rajtas voĉdoni. Je egaleco de voĉoj, propono estos konsiderata kiel aprobita. Subtenantoj havas avizan voĉon.
11. La parolata lingvo en kunveno kaj interparoladvespero estas Esperanto.
12. A.P.P.K. eldonas monatan bultenon. La ĝenerala kunveno decidas pri redakciaj

malkonsentoj kaj pri la nepresigo de senditaj artikoloj. Ĉiuj komunikaĵoj de la estraro, subskribitaj A.P.P.K. estas laŭregulaj.

13. Por recenzo senditaj libroj, interŝanĝnumeroj kaj presaĵoj apartenas al la komitata biblioteko, kiu restadas en la sidejo. Grupoj kaj membroj kiuj uzas la bibliotekon estos respondaj pri la prunteprenitaj aĵoj.
14. Nur la jarkunveno rajtas aldoni aŭ ŝanĝi jenajn statutojn. Pri punktoj nepriskribitaj en tiuj-ĉi statutoj la estraro decidas sub respondeco al la jarkunveno.

Verkoj de Dro Zamenhof.

Por ĉiuj Esperantistoj estas certe interesa scii kion la Majstro mem verkis. Ni presigos en la Bulteno la plenan liston de la verkoj de Dro Zamenhof, publikigita de la Japana Esperanto Instituto, kiel aldono al la japana revuo "La Revuo Orienta" de novembro 1927.

(A) APARTAJ ELDONOJ*

- Unua Libro. (ruse ĝuste "Mejdunarodnij Jazik..."). Eldonita 1887 de Kelter. 40 p.
- "Dua Libro de l' Lingvo Internacia." Eldonita 1888 de Kelter. 50 p.
- "Aldono al la "Dua Libro de l' Lingvo Internacia". Eldonita 1889 de Kelter. 22p. (Reeldonita 1925 kiel fotografa reproduktajo de la Centra Oficejo en Parizo.)
- "Hamleto, Reĝido de Danujo." Tragedio de Shakespeare. Eld. 1894 en Nürnberg. 137 p. (Reeld. 1902 ĉe Hachette 176p.
- "Ekzercaro de la lingvo 'Esperanto'". Eld. 1898 en Varsovio. 48p. (Reeld. 1906 ĉe Hachette.)
- "Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto." Eld. 1903 ĉe Hachette. 461p.
- D-ro Zamenhof skribis al "Lingvo Internacia" (gazeto) ke la ĉi-subaj artikoloj, kiuj troviĝas en "Fund. Krest." estas verkitaj de li mem.

"Ekzercoj"

* Lernolibroj kaj vortaroj estas aparte tradukitaj en (E) (F).

- "La novaj vestoj de la reĝo."
 "La virineto de maro." (kiu aparte eldonita en 1907 ĉe Hachette. 42p.)
 "Anekdotoj" (pliparte de D-ro Zamenhof).
 "La hejmo de la metiisto".
 "La karaj braceletoj".
 "Bagateloj" (pliparte de D-ro Z.)
 "Fingra kalendaro."
 "El la poŝto."
 "La loĝejo de la termitoj."
 "Kronika katara konjunktivito."
 "El la unua libro de la lingvo Esperanto."
 "Plena Gramatiko de Esperanto."
 "Al la historio de la provoj de lingvoj tutmondaj de Leibnitz ĝis la nuna tempo."
 "Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia." (daŭrigas)

DUONE FARITA.

BOPATRINO (*revenante de la teatro, al sia bofilo*): Ho, karulo, la teatraĵo estis tiel amuzanta, ke mi estas duone senviva pro ridado.

BOFILO: Ĉu vi ne pensas ke estus bone reiri kaj vidi la saman, morgaŭ?

Esp. en la Instruado.

La Instituto Meschini, havanta lernejojn en ĉiuj urboj de Italujo metis Esperanton en sian programon. La rekomendo farita per dekreto speciala de l' Prusa Ministerio de Publika Instruado en 1922, la reform-realgimnazio de Sprottau en Silezio enkondukis la instruadon de Esperanto en la tri superajn klasojn. La Popola Komisariero Armena en Ervian (Armenio) permesis la enkondukon de Esperanto en ĉiujn superajn klasojn de la perfektigaj lernejoj. I.E.S.

Esp. en Sudameriko.

La Esperanto-movado en Sudameriko reprenas sian antaŭ-militan etendiĝon. En Peruo kaj en Paragvajo oni ĵus formis naciajn societojn por la propagando de Esperanto. En Ĉilo nacia societo estas en formado. De post kelkaj jaroj jam la Brazila Ligo Esperantista troviĝas en la unua vico de l'transmara esperanto-movado.

La granda franca arkitekto Agache, vizitante Brazilon, ĵus faris plurajn parol-

adojn en Esperanto pri urbkonstruo antaŭ multnombra aŭditorio. I.E.S.

La stenografio kaj Esp.

Doktoro F. v. Kunowski, la kuraĝa pioniro por vera popola stenografio, kaj unu el la plej rimarkindaj kapoj de la germanaj kreintoj de stenografio, publikigis, antaŭ ne longe, tre interesan projekton de internacia stenografio. Por faciligi la disvastigon de siaj ideoj la aŭtoro uzis Esperanton en sia publikigaĵo.

La ĉefparoladoj en Esperanto kaj la alparoloj en germana lingvo de la ne-esperantista delegitaro dum la 19a Universala Kongreso de Esperanto en Danzig estis postskribitaj laŭ la germana sistemo Stolze Schrey. I.E.S.

Esp. en Radio.

En sia jara kunveno en Lausanne la Ĝenerala Kunveno de la Internacia Unio de Radiofonio alprenis rezolucion, rekomendantan la uzon de Esperanto en Radio. La Konsilantaro de tiu ĉi Unio ĵus konfirmis ĉi tiun decidon per nova rekomendo en sia kunsido, kiu fine de septembro okazis en Como (Ital.). Ĝis nun la sekvantaj stacioj jam komencis apliki la rezolucion de Lausanne: Zurich (serio de paroladoj), Kopenhago, Kalundborg, Stuttgart (relaĵo Freiburg), Breslau, Barcelona 5EAJ 1), Radio - Belgique, Bruselo (anoncado de l'semajna programo), Koenigsberg (relaĵo Danzig), Tallinn (Estonio), Genève, ne kalkulante ĉiujn staciojn, kiuj donas kursojn per Radio.

Paroladoj en Esperanto estis disaŭditaj de l'stacioj de Shanghai (Ĥinuĵo), Stockholm 11, 19, & 20.9, Oslo 23.8., 6.9, Danzig 30.7, Varsovio 5.8, Brisbane, Aŭstralio 16.8, 1, 6, 15 & 20.9.

Radio - Genève ĵus komencis novan Esperanto kurson (ĉiujauĉe; la stacio de Nagoja JOOK (Japano, dissendis la unuan esperantokurson per Radio en Japanujo la 20.9. La stacio de Hamburg relaĵo Bremen-Hannover), samkiel la rusaj postenoj de Harkow (ĉiumerkrede), Leningrad (ĉiuvendrede), Moskva (ĉiutage) kaj Odesa (ĉiumerkrede) daŭrigas siajn disaŭditajn regulojn en Esperanto. I.E.S.

La Japana fervojaro kaj Esp.

Jus aperis en Japanujo verkaĵo, kiu montras, ke oni pli kaj pli uzas Esperanton. La ministerio de l' fervojoj en Tokio eldonis en Esperanto belan volumon artan pri Japanujo, destinita por faciligi la vojaĝojn en tiu ĉi lando, donante al la eksterlandanaro ĉiujn utilajn informojn.

I.E.S.

Aan de Deelnemers aan onzen "Centra Esperanto Kurso".

Hoe meer gij vordert in de kennis der wereldhulptaal Esperanto des te vaker rees misschien bij u de vraag op, wat gij na het eindigen van den leergang doen zult om het geleerde te onderhouden, uitte breiden en om er practisch nut uit te trekken. Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato, dat u een leergang bezorgde waarover menigeen zijn hoogste voldoening uitdrukte, denkt dat er een band moet blijven bestaan tusschen de inrichters van en de deelnemers aan den cursus wederzijds en tusschen de deelnemers onderling. Voor dit doeleinde is voorzeker niets beter geschikt dan dit "Bulteno", het maandelijksch orgaan van ons comiteit. Dit bulletijn, dat onder de leiding staat van een zeer bekwaam taalkundige en zelfs buitenlandsche medewerkers telt, levert u niet enkel leesmateriaal, maar houdt u ook op de hoogte van de vorderingen van de Esperanto taal. Mits een jaarlijksche bijdrage van 10 fr. per jaar is men beschermend lid van Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato. Deze leden ontvangen het maandelijksch bulletijn en mogen o. m. kosteloos gebruik maken van onzen inlichtingsdienst mits opzending van een postzegel voor het antwoordporto.

Een eenvoudig abonnement kost 3 fr. per jaar.

Alle bijdragen moeten gezonden worden aan den heer Jos. Swalf, August Sniedersstraat, 51 Antwerpen. A.P.P.K.

RICEVITAJ PRESĀĴOJ.

Amerika Esperantisto, okt. — La Verda

Stelo, n° 11, nov. — International Language, dec., jan. — La Suda Kruco, okt., nov. — Roia, nov., dec. — Le Sincérisme, dec. — Sveda Laborista Esperantisto, nov., dec. — Argentina Esperantisto, nov. — La Revuo Orienta, nov. — Heroldo de Esperanto, noj 46, 47, 48, 49. — Informoj de Esperanto Asocio de Estonio, nov., dec. — La Unuigita Tuthomaro, nov., dec. — L'Araldo Esperantista, nov. — La Etulo, jan. — Vegetarano, okt. — Le Matérialiste, nov.

ILUSTRITAJ POSTKARTOJ.

Ĉiam uzu por via korespondado la luksajn ilustritajn poŝtkartojn, eldonitajn de A.P.P.K. (Kolekto Nels).

Aperis du malsamaj serioj da 10 kartoj. Prezo po serio : 1.50 Bfr.

Haveblaj A.P.P.K., Groote Beerstraat, 7 Antwerpen.

La teksto sur la karto estas trilingva : flandra, Esperanta, franca ; do ankaŭ uzeblij de neesperantistoj.

ESPERANTO INSIGNO.

Verda stelo sur blanka rondo (17 mm.) buton-, broĉ- aŭ pendaĵformataj je 2.50 Bfr. La plej bela, la plej malkara ! Havebla ĉe ĉiuj anoj de A.P.P.K.

Centra deponejo : Kalversstraat, 12 Antwerpen.

Serĉas ian ajn okupon, rusa samideano, 38 jara, posedanta plenan mezgradan instruadon, librotenisto, perfekte scianta krom la rusa lingvo, la esperantan kaj la hispanan lingvojn, kaj iomete la anglan, germanan kaj francan lingvojn. Oni turnu sin al la administracio de la Bulteno.

BELGAJ KARBOJ

Por via vintroprovizo petu prezojn ĉe Agento de la "Belgische Kolenhandel" J. Bovoy, Minderbroedersrui 64, Antwerpeno.

Membro de A.P.P.K.

BULTENO

MONATA EL DONO DE LA

ANTVERPENIA PROPAGANDA KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHE STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSSTRAAT 51

4^A JARO

N^o 2

FEBRUARO 1928

JARA ABONO
UNU NUMERO

BELGUJO : 3.— Bfr.
" 0.30 Bfr.

EKSTERLANDO 1.25 Sfr.
" 0.15 Sfr.

La Instruado de Esperanto.

Opinio de la fama edukisto
prof. J. J. Findlay.

Nenion mi sciis pri tiu ĉi lingvo (Esperanto) ĝis kiam mi estis invitata aliĝi al Komitato de la Brita Asocio (1921) por esplori la eblecojn adopti iun lingvon kiel rimedon de internacia interŝanĝado por sciencaj celoj. La membroj de tiu ĉi Komitato, krom unu escepto, opiniis ke naciaj lingvoj, kiom ajn disvastigitaj kaj konataj en kelkaj partoj de la terglobo, estis neakcepteblaj; ke Latino estis multe tro malfacila (oni donis ekzemplojn kiuj evidentigis klare tiun ĉi punkton); kaj ke inter ĉiuj elpensitaj lingvoj nur Esperanto sukcesis. La disvastiĝo de Esperanto de post 1921 — speciale rilate radiodissendado sur la Kontinento — tute konfirmas tiujn ĉi opiniojn. Por kontroli la deklaron de la Komitato koncerne la facileco de la lernado, mi invitis kelkajn instruistojn de Manchester aliĝi al eksperimenta klaso, kaj la re-

zultatoj montris ke la konstruado de Esperanto ebligas tiel al plenkreskuloj kaj kiel al infanoj ĝin uzi por praktika uzado longan tempon antaŭ ol klaso komencinta la francan aŭ germanan lingvon povis tion fari. La kelkaj lernejoj en Anglujo, kaj la pli granda nombro sur la Kontinento, kiuj enkondukis kurson de Esperanto por infanoj ĉirkaŭ dekjaraj, konfirmas tiun ĉi opinionon.

Ne enirante en detalojn, tri punktoj ŝajnas esti klaraj:

1. Unu jaro da laboro en Esperanto, komence de la Klaso V, dum duona horo ĉiutage, donus al la infanoj sufiĉan bazon por ebligi ilin korespondadi en simpla prozo kun infanoj de fremdaj landoj; dum dua jaro ĉio kion ili devus fari estus pasigi unu horon ĉiusemajne legante kaj respondante la leterojn el eksterlando. Se post tio ili ĉesos uzi la lingvon, ĉu en la lernejo aŭ aliloke dum kelkaj jaroj, ili kapablus reposedi ĝin, same kiel iu ajn alia kutimo (ekz. glitkuri sur glacio) akirita dum la infaneco, povas esti revigligata laŭ bezono.

2. Tiu ĉi jara kurso servus samtempe kiel

praktika ekzercado en gramatiko, ĉar la elementoj de universala gramatiko, kazoj, nombro, sekso, tempo, modo, vortspecoj, k. t. p., estas distingataj dum la laboro daŭrigas; kialo por lernado de gramatiko estas tiamaniere donata kion oni sentis neniam tiel longe kiel la infano nur limiĝas je la uzado de sia gepatra lingvo. Oni certe ne bezonas tiun ĉi abstraktan lingvan sciencan pro ĝi mem; oni certe povas paroli kaj skribi bone en sia propra lingvo sen tia ekipado; sed ĝi estas necesa kiam la lernanto daŭrigos poste per la franca aŭ la latina lingvo. Tiuj ĉi lingvoj kompreneble ofertas egalan okazon por gramatika scienco, sed la komencaj malfacilaĵoj estas multege pli grandaj, ĉar la malfacilaĵoj kaj malregulaĵoj de ĉiuj historiaj lingvoj malebligas al komencanto uzi la lingvon kun ia forto. Ĝis kiam la lernanto sentis la diferencon eklernante Esperanto'n aŭ Ido'n, li ne povas imagi la helpon de la uzado de lingvo kun minimumo da reguloj kaj sen esceptoj. Eĉ se Esperanto havus nenian praktikan utilecon, ĝia valoro simple kiel enkonduko en la principoj de gramatiko valorus la 120 horojn kiujn oni demandas por ĝi.

3. Post unu jara kurso de Esperanto, kion oni devus enkonduki por la lernantoj de la elementaj lernejoj antaŭ la disiĝo de la vojoj al centra, duagrada aŭ alia instruado, restas almenaŭ ankoraŭ du jaroj antaŭ ol tiuj kiuj restas en la elementa lernejo atingas la aĝon de dekkvar jaroj kaj foriras. Al tiuj ĉi oni devus oferi la elekton daŭrigi per Esperanto aŭ komenci la francan aŭ germanan lingvon.

La lastaj du jaroj de la elementa lernejo certe povus toleri duonan horon ĉiutage por unua jaro de franca lingvo kaj tri horojn ĉiusemajne por dua jaro; tiamaniere ekipitaj, kun la jaro de esperanto malantaŭ tio, knaboj kaj knabinoj je la aĝo de dekkvar jaroj povus eniri la modernan mondon en bonaj kondiĉoj. Ĉar oni devas akcepti ke la mondo de 1927 estas nova mondo kompare kun tiu de 1902, de kiu tempo datumas multe de la oficiala kaj profesia pedagogio de la elementa lernejo.

El "International Language, Januaro 1928"
tradukis J. J.

N. B. La supra artikolo estas ekstrakto (p. 308-311) el "The Foundations of Education," Vol. II. *The Practice of Education*, by Prof. J. J. Findlay. University of London Press, Ltd. 10/6 nett.

Raporto pri la agado de A.P.P.K. dum la jaro 1927.

La komenco de la nova jaro tute ne estis favora al ni. Granda perdo trafis nin en la persono de nia unua sekretario, S-ro Posener kiu preskaŭ subite mortis la 31an de decembro 1926.

Pro la funebro la estraro de A.P.P.K. decidis ne kunveni dum la monato de januaro, kaj la unua kunsido do okazis la 3an de februaro, kunsido precipe dediĉata al la honorigo de nia karmemora amiko, A. Posener, kaj al la malkovro de la memortabulo.

La 17an okazis la ĝenerala kunveno, pri kiu raportis S-ro Cats en la Bulteno.

Agado dum 1927.

PROPAGANDO. Ni la tutan jaron daŭre kaj efike propagandis. La 12an de marto ni petis la permeson al la ministro de fervojoj disponi pri magazeno en la centro de la urbo, - Lange Nieuwstraat - por organizi ekspozicion de Esperantaĵoj. La jesa respondo de la ministro alvenis la 11an de aprilo, kaj tuj la membroj komencis la aranĝon de l' ekspozicio, kiu ĉiudusemajne aliĝis. Tiu ekspozicio per la konstanta anoncado en la ĵurnaloj bonege sukcesis.

Malfeliĉe post du monatoj pro malkonstruo de la domo, ni estis devigataj ĉesi tiun propagandon.

Senlace ankaŭ estis la rekta propagando por la oficialaj kursoj pere de aŭdiĝoj, de festoj, pri kiu mi iomete pli detale raportos, kaj de artikoloj en la franc- kaj flandralingvaj ĵurnaloj.

Grandega propagando, laŭ la instigo de S-ro De Waegenaere, en la tuta flandra parto de la lando komenciĝis pere de la forsendo de 25.000 flugfolioj, al ĉiuj flandralingve eldonataj ĵurnaloj, kaj ĝis en la plej malgranda urbeto de Flandrujo por "La Centra skriba Kurso". Tiu kurso, estas

granda sukceso. Kelkcentoj da personoj, loĝantaj en 73 diversaj lokoj, partoprenas en ĝi.

PAROLADOJ. Krom la paroladoj en la diversaj aliĝintaj grupoj, okazis parolado en la "Girls Friendly Society" de nia prezidanto S-ro Jacobs. La "Anglo-Belgian Times" detale pri tiu parolado raportis.

EKSKURSOJ. La 21an de julio multe da gemembroj el la aliĝintaj grupoj, invitataj ĉe la gastema familio Keverijn, iris al Hemixem. Ke tiu ekskurso bone sukcesis, pri tio, kiel pri la aliaj al Contich kaj Vlissingen (tiuj lastaj organizitaj de la Rekta Vojo), nin informas la detalaj raportoj en la Bulteno.

FESTO. Laŭ laŭdinda kutimo A.P.P.K. festis la 3an datrevenon de sia starigo per artfesto, sed kiu tiun ĉi jaron superis ĉiujn festojn samspecajn. Samtempe okazis la disdonado de la diplomoj kaj donaco al la laŭreatoj de la oficialaj kursoj. Nia sindonema samideano, S-ro De Waegenaere, akiris la kunhelpon de la tre konata artistino F-ino Bertrijn kaj de S-ro Van de Velde, la bone konata samideano, por la reprezentado de "BIETJE", la unuakta teatraĵo de S-ro Sabbe. Ankaŭ aliaj profesiaj artistoj, inter kiuj S-ino M. Belloy, senpage kunlaboris al la sukcesigo de tiu festo.

S-ro Verschuere, ĉefinspektoro de la oficialaj lernejoj, honoris nin per sia ĉeesto, kaj senkulpigis la neĉeestadon de la Skabeno pri publika instruado, kiu same kiel S-ro Huysmans, tiutempe ministro de Sciencoj kaj Artoj, per tre afabla letero senkulpigis sin pri la neĉeesto.

Dum tiu festo ni havis la plezuron konatiĝi kun kelkaj fremdlandaj samideanoj, inter kiuj S-ro Hansen el Danujo respondis je la bonvenigaj vortoj de la prezidanto.

Detalaj raportoj pri tiu festo aperis en diversaj ĵurnaloj de la urbo.

GRUPA VIVO. Ĝojiga novaĵo estis por ni ke S-ro Huysmans, nun eksministro de Sciencoj kaj Artoj, kaj S-ro Verschuere, ĉefinspektoro de la Antverpena instruado, akceptis la honormembrecon de A.P.P.K.

Bedaŭrinda okazintaĵo estas ke sekve de miskompreno "Nia Ideo" ekŝiĝis el A.P.P.K.

pretekstante ke ili ne plu deziras kunhelpi al la grandigo de burĝa organizaĵo.

Aliflanke ni havis la plezuron bonvenigi en nia mezo la novfonditan grupon "La Hobokenaj Esperantistoj", kiuj tuj post la starigo de la grupo petis la aliĝon.

BULTENO. Laŭ propono de iu membro dum la jarkunveno de 1926 oni malfermis en la bulteno rubrikon al la mondonacoj por subteno de la bulteno. Ni entute enkasigis 205,05 fr.

ESTRARO. La estraro, elektita el la delegitoj de la diversaj grupoj konsistis el: Prezidanto, s-ro Jacobs; Vic-prezidanto, s-ro De Waegenaere; Unua Sekretariino, f-ino A. Van Ganse; Kasisto, s-ro Swalf; Dua Sekretario, s-ro Cats; Bibliotekisto, s-ro Mortiers; Propagando kaj Festoj, f-ino B. Geers.

Konkludo.

Entute ni prave povas aserti ke dum la pasinta jaro A.P.P.K. digne plenumis la alprenintan mision. 1927 daŭre brilos en la historio de la loka kaj enlanda esperanta movado. Kaj nun kuraĝe antaŭen al novaj venkoj!

A. V. G.

La estraro de A.P.P.K. por la jaro 1928 konsistas el: Prezidanto, s-ro Jacobs; Vic-prezidanto, s-ro De Waegenaere; Unua Sekretario, s-ro Cats; Dua Sekretariino, f-ino Keverijn; Kasisto, J. Bovoy; Bibliotekisto, s-ro M. Van Tiggel.

Verkoj de D-ro Zamenhof.

(daŭrigo)

- "Fundamento de Esperanto". Gramatiko, ekzercaro, vortaro. Eld. 1905 ĉe Hachette.
- "La Predikanto". Libro el la Biblio. Eld. 1907 ĉe Hachette. 26 p.
- "La Revizoro". Komedio de Gogol. Eld. 1907 ĉe Hachette. 99 p.
- "La Ravistoj". Dramo de Schiller. Eld. 1908 ĉe Hachette. 144 p.
- "Georgo Dandin". Komedio de Molière. Eld. 1908 ĉe Hachette. 51 p.
- "Ifigenio en Taŭrido", Dramo de Goethe. Eld. 1908 ĉe Möller & Borel (Hachette). 108 p.

- "La Psalmaro". Libro el la Biblio. Eld. 1908 ĉe Hachette. 165 p.
 "La Sentencoj de Salomo." Libro el la Biblio. Eld. 1909 ĉe Hachette. 59 p.
 "Lingvaj Respondoj aperintaj en la 'Revuo' Eld. 1910 ĉe Hachette. 30 p.
 "Proverbaro Esperanta." Laŭ verko de M. F. Zamenhof. Eld. 1910 ĉe Hachette. 74 p.
 "La Batalo de l'vivo." Rakonto de Dickens. Eld. 1910 Stead kaj Hachette. 88 p.
 "Marta." Rakonto de Eliza Orzesko. Eld. 1910 ĉe Hachette. 237 p.
 "Genezo." Unua libro de Moseo. Eld. 1911, ĉe Hachette. 120 p.
 "Eliro." Dua libro de Moseo. Eld. 1912 ĉe Hachette. 99 p.

(daŭrigas)

**La partoprenantoj de la
 "Centra Esperanto Kurso" logas
 en la sekvontaj komunumoj :**

Aarschot, Achterbroeck, Antwerpen, Baasrode, Beeringen, Berchem, Berlaar, Bissegheem, Bonheyden, Boisschot, Boom, Borgerhout, Brugge, Coolscamp, Cortenbosch, Couckelaere, Deurne, Eeckeren, Eecloo, Eerneghem, Erondegem, Gavere, Genck, Gent, Hemixem, Herenthals, Herselt, Heule, Hoboken, Hofstade, Hoogaerde, Isegheem, Kerksken, Knocke a/z, Kortrijk, Lebbecke, Lede, Leuven, Liechtervelde, Lier, Lokeren, Lummen, Maeseyck, Machelen, Mechelen, Meenen, Meire, Meirel-Melle, Moorseele, Oostacker, Oostende,

Oostwinkel, Poppel, Ronse, Rousselaere, Santhoven, Scheulen, S' Gillis, S' Jans Molkenbeek, S' Niklaas, Syngem, Thourout, Tongerlo, Tremeloo, Turnhout, Velsicque, Visé, Wacken, Wilmarsdonck, Wilryck, Wyneghem, Yper.

Grupa Vivo.

LA REKTA VOJO.

Monata Programo de la Sabataj kunvenoj

- 3an de Marto : BALO
 10an " : Estrara kunveno
 15an " : Parolado pri Rubens de S-ro De Waegenare kaj pri la Esperanta Movado de S-ro Jacobs en flandra lingvo.
 17an de Marto : Disputadvespero.
 24an " : Parolado de S-ro Lodema pri "Mia unua Marvojaĝo".
 31an de Marto : Antaŭlegado de F-ino Keverijn.

LA HOBOKENAJ ESPERANTISTOJ

kunvenas la 1an kaj 3an Sabaton de ĉiu monato je la 6 1/2 h. vespere en la sidejo Wielrijdersstraat, 36, Hoboken.

RICEVITAJ PRESAĴOJ.

Argentina Esperantisto, nov. 1927 — Bulteno de I.S.A.E., jan. — Heroldo de Esperanto, n-oj 50, 51, 52 (1927) ; 1, 2, 3 (1928). — Hispana Esperantisto, n-o 1 jan. — Informoj de Esperanto Asocio de Estonio, jan. — International Language, feb. — La Revuo Orienta, dec. — La Suda Kruco, dec. — Svenska Esperanto Tidningen La Espero, nov. dec. — Le Sincérisme, jan. — Cosmoglotta, jan.

Gesamideanoj ! Faru propagandon per la uzado de

ESPERANTISTAJ ADRESKARTOJ

(Kun Verda Stelo)

haveblaj ĉe

H. VAN DER MAST

Vlagstraat, 9

ANTWERPEN (Belgujo)

ENLANDO : po 100 kartoj 12.50 fr.

EKSTERLANDO : 15.— fr.

La sendkostoj estas enkalkulitaj. — — POŝTĈEKO 209852

BULTENO

MONATA DE EL DONO LA

ANTVERPENAJ PROFAGANDA E ESPERANTO KOMITATO

REDAKTEJO: ^{Gen. 1928}
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSTRAAT 51

4^A JARO

N^o 3-4

MARTO-APRIL 1928

JARA ABONO
UNU NUMERO

BELGUJO : 3.— Bfr.
" 0.30 Bfr.

EKSTERLANDO 1.25 Sfr.
" 0.15 Sfr.

La malinterkonsento daŭrigu !

Antaŭ ol fini la jaron 1927a, A. P. P. K. faris novan provon por efektivigi la necesegan unuecon inter la lokaj esperantistoj. Dum privata interparolado kiun s^{ro} De Waegenaere, vicprezidanto de A. P. P. K., havis kun unu el la plej malnovaj samideanoj el nia urbo, tiu ĉi sinjoro esprimis sian bedaŭron pri la nuna divido inter la Antwerpen'aj esperantistoj kaj eventuale akceptis la mision kunvenigi kaj prezidi arbitracian komision por forigi la malinterkonsenton se li pri tio oficiale estus petata. La 20an de decembro A. P. P. K. sendis al la bonvolema samideano la sekvantan leteron :

Estimata Samideano,

A. P. P. K. kunsidanta en ĝenerala kunveno la 15an de decembro, aŭdinta la raporton pri la interparolado kiun s^{ro} De Waegenaere havis kun vi, notas tion kaj konfirmas la parolojn ke en A. P. P. K. ĉiam ekzistis kaj ankoraŭ ekzistas la deziron pri sincera kunlaborado por la sukcesigo de la Esperanto movado. Se vi observus ĉe la alia flanko la saman

seriozan deziron ni tre multe ŝatus vian peradon.

Ni estus al vi tre dankemaj se vi bonvolus komuniki vian respondon plej malfrue la 18an de januaro, dato je kiu okazos la jarkunveno de A. P. P. K.

Dankante vin antaŭe, ni sendas al vi, estimata sinjoro, la esprimon de niaj plej samideanaj salutoj.

∴

Je la ŝiksita dato la esperiga respondo ne estis alveninta. Dum la monato februaro s^{ro} De Waegenaere havis denove interparoladon kun s^{ro} R. Tiu ĉi sinjoro diris ke « ĉe la nealigintoj al A. P. P. K. li ne povis observi deziron por kuna agado kun la « kontraŭuloj ». Oni daŭrigos laborante aparte, flanko je flanko, ĝis kiam la tempo venos kiam plena kunlaborado estos ebla. » Kvankam la respondo ne mirigas nin, tamen ni ne atendis ĝin. Nur pro la alta celo de nia movado ni sincere bedaŭras ke pro la obstineco de eble nur unu persono la loka movado devos suferi ankoraŭ dum longa tempo.

A. P. P. K.

Elparolo kaj scio de esperanto.

Ĉe nekredema publiko oni ofte aŭdas demandojn, ĉu esperanto estas de ĉiuj nacioj same elparolata kaj komprenata. La demandojn respondas la esperantistoj jene: «Jes, ĉiu, kiu bone ĝin scias, li apartenu al kiu ajn nacio, elparolas kaj komprenas ĝin same.»

Por bone scii esperanton estas necese aŭ lerni laŭ bona lernolibro, verkita en **esperanta spirito** kaj substrekanta diversecon inter la nacilingva kaj esperanta elparolado kaj sintakso, aŭ vizitadi kursojn de instruisto, kiu esperanton bonege regas kaj pardonas al la lernanto ĉe ne unu kontraŭesperantan eraron! Sed ne sufiĉas esperanton ellerni, necesas konversacii en la klubaj kunvenoj, vizitaj ofte de fremduloj, laŭ kies parolo oni interalie lernas **internacian stilon**, kion cetere oni ellernas ankaŭ per laŭta legado de bonaj esperantaj aŭtoroj alinaciaj.

Ai severa ekzameno pri scio de esperanto submetas sin tiu, kiu vizitas la unuan feliĉan universalan kongreson! Dum unu semajno oni konvinkigas ne sole pri scio de esperanto kaj ĝia praktika apliko, sed aŭskultinte parolojn kaj paroladojn de eminentaj esperantistoj diversnaciaj, oni ankaŭ ekkultimigas **pensi esperante-internacie**.

La komencantoj kaj kursanoj pekas memkompreneble multe kontraŭ la elparolo kaj internacia spirito de esperanto kiel ĉe lernado de kiu ajn lingvo viva:

Francoj forgesas ekzemple, ke «h» estas ĉiara spirita forte, Germanoj emas konfuzi «p» kaj «b», «l» kaj «d», «s» kaj «z», Hispanoj kaj Italoj elparolas «z» kiel «c», Poloj kaj Rusoj moligas «d», «t», «n» je «dj», «tj», «nj». Rusoj konfuzas «h» kun «g», Svedoj elparolas «j» kiel «dj» kaj «sc» kiel «c», ekstremorientanoj konfuzas «l» kun «r». Angloj konfuzas la vokalojn «a, o, u,» elparolante ilin tro mole kaj nekclare, ĉe Magiaroj «e» alproksimigas al longa «i». — Kontraŭ esperanta akcento pekas plejparte Francoj, metante ĝin kiel en la franca lingvo sur la lastan silabon, ofte anstataŭ ĉejoj kaj Magiaroj, akcentante kiel en sia gepatra lingvo sur la unua.

Kontraŭ la internacia spirito de esperanto eraras ne sole la kursanoj sed ofte ĉe tiuj, kiuj ne pensante en esperanto, tradukas laŭvorte el sia gepatra lingvo esperanten.

KIEL LA AŬSTRIAJ DETEKTIVJOJ SERĈIS VERKOJN DE AŬTORO KARA SAMIDEANO.

(Mondmilita rememoro)

En aŭgusto 1914 estis surprizitaj ĉeĥaj esperantistaj ĉefuloj en Praha per loĝejoj revizi-

zitoj, kiujn faris detektivoj, provizitaj per ĉiopa dekreto «... ĉar ĉe vi troviĝas aŭ povus troviĝi patrujperfidaj aferoj, oni ordonas...» Ĉe la revizio la detektivoj insiste postulis precipe transdoni korespondaĵojn, flugfoliojn, broŝurojn, kaj librojn, verkitajn de aŭtoro Kara Samideano. Tial estis konfiskitaj ekzemple ankaŭ fremdlingvaj libroj pri kuirarto, vortaroj de ekzotikaj lingvoj, preĝlibroj, prezaroj, muziknotoj, mallonge dirite ĉio, kio surhavis la vortojn «kara samideano» aŭ «samideane». Kelkaj policanoj forportis sian rabajon en la poŝo aŭ sur la brako, tiuj pli ambiciaj forveturigis ĝin sur ĉaro. Estas memkompreneble, ke la nomitaj revizioj kaŭzis al la esperantistoj multajn malagrablaĵojn kaj malutilojn: evitadis ilin — per unu piedo jam starantaj en la malliberejo — la kunloĝantoj, patriotaj domposedantoj pripensadis ilin malluigi. Sed ankaŭ la esperantistoj estis surprizitaj per tiu vigleco de la polico! Ili ja bone sciis, ke ili en eksterlando uzis esperanton por propagando de kulturaj celadoj de ĉeĥa nacio, sed tion ili ne konsideris perfido je la aŭstria stato. Nur 6 semajnojn post la revizio ili ekkomprenis ĉion! Invitite al la policedstrejo ili eksciis, ke tiampe ĉe la poŝtoŭficejo estis konfiskitaj esperantaj flugfolioj, senditaj Bohemujon de francaj esperantistoj helpe de la italaj, kiuj enhavis alvokon «Formetu armilojn!» kaj estis surskribitaj per kutimaj vortoj «Kara samideano!» Estas memkompreneble, ke la detektivoj estus fortostreĉe laborintaj, se ili estus forportontaj al policoŭficejo ĉion, kion la viglaj esperantistoj de Praha helpe de la eksterlandaj «karaj samideanoj» amasigis en siaj hejmarĥivoj kaj bibliotekoj!

P.-H.

El «Bulteno de Preso» Praha.

Provizora programo de la 20a kongreso universala.

Merkredon, 1 Aŭg.: Malfermo de la oficejoj en la Akceptejo.

Ĵaŭdon, 2 Aŭg.: Vespere. Eventuale, por la jam alvenintaj kongresanoj, intima kunveno.

Vendredon, 3 Aŭg.: Vespere. — En ĝardeno kaj salono «Harmonio»: Interkonatiga kunveno; iluminacio de la ĝardeno, kun koncerto de la Polica Muzikistaro. Donaco de standardo, farita de la membrinoj de «La Verda Stelo», al la Antverpena Polica Grupo Esperantista. — Balo.

Sabaton, 3 Aŭg.: 10 h. Supera Komerca Instituto (Aŭlo); Solena malfermo de la IVA

Somera Universitato. Unuaj prelegoj.

Hebra diservo.

15.30 — 17.30 : Koncerto en Zoologia Gardeno.

20.30 : en la granda Festsalono de la Zoologia Gardeno : Solena malfermo de la Kongreso (Galerioj rezervotaj al la publiko).

Dimanĉon, 5 Aŭg. : 9a h. Katolika Diservo en preĝejo S-ta Jozefo (Esperanta prediko.) — Protestantia Diservo.

10a h. : Kunveno en la urba Parko.

10.30 : Promenado tra la urbo kun tri aŭ kvar uniform-muzikistaroj.

La promenado finiĝas je 11.30 a antaŭ la urbodomo, en kiu tuj poste havos lokon la Oficiala Akcepto de la Urbestro. — Subskribo de la Ora Libro de la urbo.

15.30 — 17.30 : Koncerto en Zoologia Gardeno. Vespere : Harmonia koncerto en Zoologia Gardeno.

Lundon, 6 Aŭg. : 9-12 k. : Somera Universitato (Supera Komerca Instituto) : Prelegoj.

9-12 k. : Fakaj kunsidoj en Urba Normala Lernejo.

15-18 : Unua laborkunsido kun temo : Radio.

15.30-17.30 : Koncerto en Zoologia Gardeno.

Vespere : Koncerto en la Flandra Operdomo.

Mardon, 7 Aŭg. : 10 h. Dua Laborkunsido kun temo : Universitatoj.

Posttagmeze : Malfermo de la VIIa Internacia Esperantista Blindukongreso.

Vespere : Teatra reprezentado en Franca Operdomo.

Merkredon, 8 Aŭg. : Tutaga ekskurso al Bruselo per speciala(j) vagonaro(j). **Aparte pagota.**

Vizito de la urbo. Oficiala akcepto en la urbodomo. Komuna tagmanĝo.

Vespere : veturado al Mechelen (Malines) por aŭskulti sonorilaran koncerton.

Akcepto oficiala.

Reveturado al Antverpeno.

Ĵaŭdon, 9 Aŭg. : 9-12 Prelegoj en Somera Universitato (Komerca Instituto).

9-12 : Fakaj kunsidoj en Normala Lernejo.

15.30-17.30 : Koncerto en Zoologia Gardeno.

15-18 : Tria kunsido okaze de Jubileo de H. E. A.

Vespere : (Eventuale) Kongresa Festeno. Aparte pagota.

Kun koncerto organa, kaj internacia koncerto. Programo kunmetota kun diverslangdaj kantistoj kaj deklamistoj.

Vendredon, 10 Aŭg. : 9-11 : Prelegoj en Somera Universitato (Komerca Instituto).

9-11 : Fakaj kunsidoj en Urba Normala Lernejo.

11 h. Dua Laborkunsido.

Tagmeze : Sonorilarkoncerto (Katedralo).

Posttagmeze : Gardenfesto kaj koncerto en la Parko.

Vespere : Granda Internacia Kostumbalo.

Sabaton, 11 Aŭg. : 11 h. : Solena Ferma Kunsido.

15.30-17.30 : Koncerto en Zoologia Gardeno.

Vespere : Adiaŭa Balo.

Dimanĉo 12 Aŭg. : Forveturo al postkongresaj ekskursoj.

— La kongresanoj ĝuos senpagan eniron en la Zoologian Gardenon.

— Tre verŝajne, ni akiros, ke la urbestro organizos ĉiutage viziton al la haveninstalajoj. Ĉiun tagon povus partopreni + 300 kongresanoj.

— La kongreskomitato organizos postkongresan vojaĝon kvintagan tra Belgujo. (Ostendo, Bruĝo, Gento, Namur, Dinant, Loveno, Liège, Verviers, Grotjo de Hanj).

Esperanto radio-kalendaro.

Gesamidcanoj, aŭskultu la dissendojn en Esperanto !

Dimanĉon.

Horo

7-8 atm. : Moskvo (M. G. S. P. S. Komintern. 1450 m. — 20 kw.) Seĝoj kaj novaĵoj. Sro Victor Javoronkov.

10-10 1/2 atm. : Hamburg (Norag — 394,7 m. — 4 kw.) kaj relajstacioj.

" " : Bremen (252,1 m. — 0,7 kw.).

" " : Hanover (297 m. — 0,7 kw.).

" " : Kiel (254,2 m. — 0,7 kw.).

Parolado en Esperanto. — Sro Karl Minor.

11-12 atm. : Harkov (477 m.), Esperanto gazeto « Etero ».

5.45-6.15 ptm. : Königsberg i. Pr. (329,7 m. — 4 kw.) kaj relajstacio.

" " : Danzig (272,7 m. — 1,5 kw.) Esperanto instruado, kelktage por komencantoj, kelktage por progresintoj. Sro Schattat, Knochenstrasse, 61, Ostmarken-Rundfunk, A. G. Ostmesse.

9.30 ptm. : Leningrad (1000 m. — 18 kw.) kaj 223,9 m. — 10 kw.) Seĝoj kaj novaĵoj.

10 ptm. : Zürich (568 m. — 1 kw.). — Parolado.

Lundon.

5.30 ptm. : Kaunas (Kovno) (2000 m. — 7 kw.). Parolado pri diversaj temoj. — Sro A. Paskevičius, Radio Stotis.

8.40-9.10 ptm. : Falun (S. M. Z. K. — 357 m. — 7 kw.) Esperanto Radio Klubo.

9-9.30 ptm. : Minsk (Sovnarkom — 1170 m. — 4 kw.) Blank-rusia Radio gazeto en Esperanto.

- 10.15 p.m. : Brussel (Radio Belgique — 508,5 m. 1,5 kw.). Programo de la semajno : lastaj novaĵoj pri la 20a universala kongreso de Esperanto. Sro Dro Kampencers, 20, rue aux Laines.
- 9.30 p.m. : Moskvo (vidu ĉi supre). — Seligoj kaj novaĵoj.

Mardon.

- 6.30 p.m. : Danzig (272,7 m. — 1,5 kw.). — Esperanto leciono.
- 6.40-7.10 p.m. : Minsk (vidu ĉi supre).
- 9 p.m. : Lyon (Radio Lyon, 291,3 m. — 1,5 kw.). Esperanto kurso.
- 10 p.m. : Moskvo (vidu supre).

Merkredon

- 6.40 p.m. : Brno-Brunn (441,2 m. — 3 kw.). Instruado por komencantoj (ŝajne flaita). (Eble ankaŭ je aliaj tagoj).
- 7-7.30 p.m. : Odessa (975 m.). Esp. instruado kaj informoj.
- 9.30 p.m. : Moskvo (vidu supre).

Ĵaŭdon.

- 5.45-5.55 p.m. : Wien (Radio-Wien, 577 m. — 1,5 kw.) kaj relajstacioj.
- » » Graz (357,1 m. — 1,5 kw.).
 - » » Innsbrück (294,1 m. — 0,5 kw.).
 - » » Klagenfurt (272,7 m. — 1,5 kw.).
- Parolado pri diversaj temoj. Sro W. Smital.
- 7 p.m. : Tallinn (408 m.). Informoj pri la kultura kaj ekonomia vivo en Estonujo.
- 7.15 p.m. : Genève (760 m. — 1,5 kw.). Esperanto kurso. Sro E. Privat.
- 8 p.m. : Paris (F. P. T. T., 438 m. — 0,5 kw.). Esperanto kurso.
- 8.15 p.m. : Parjs (Radio Paris, C. F. R., 1750 m. 3 kw.). Komunikoj en Esperanto.
- 10 p.m. : Novosibirsk (1117 m.). Instruado kaj parolado.

Vendredon.

- 6.15 p.m. : Stuttgart (379,7 m. — 4 kw.) kaj relajstacio Freiburg (577 m. — 0,7 kw.). Esperanto instruado ĉiun duan vendredon.
- 6.45 p.m. : 10 min. programo por la venonta semajno.
- 6.50 p.m. : Zürich (588 m. — 1 kw.). 10 min. Esperanton tradukita artikolo pri grava svisa afero, kiu ankaŭ interesas eksterlandon.
- 7 p.m. : Zagreb (310 m.).
- 9.15 p.m. : Breslau (322,6 m. — 4 kw.) kaj relajstacio.
- » » Gleiwitz (250 m. — 0,7 kw.). 10 min. plej ofte temoj pri Silezio.
- 10.15 p.m. : Moskvo (vidu supre).

Sabaton.

- 5.30 p.m. : Bern (411 m. — 1,5 kw.). Esperanto kurso.
- 5.55 p.m. : Königsberg i. Pr. (329,7 m. — 4 kw.) kaj relajstacio.
- » » Danzig (272,7 m. — 1,5 kw.). 5-10 min. programo de la venonta semajno.
- 6.20 p.m. : Köbenhavn kaj Kalundborg (vidu supre).
- 7.45 p.m. : Moskvo ankaŭ Popoff, 675 m.). Programo de la venonta semajno.
- 10 p.m. : Leningrad (vidu supre).

Ĝiutage.

- 6.55 p.m. : Königsberg i. Pr. kaj relajstacio Danzig. Anonco de la stacio kaj ondlongeco en Esperanto.
- 10.45 p.m. : Leipzig (365,8 m. — 4 kw.) kaj relajstacio.
- » » Dresden (275,2 m. — 0,7 kw.). Informoj pri la vetero. Grosse Dresdner Funkausstellung, Töpferstr., 2/11. Leipzig.

Verkoj de D-ro Zamenhof.

(daŭrigo)

- « Gentoj kaj Lingvo Internacia. » Memuaro. Eld. 1912 de la Esperanto-Propaganda Instituto en Leipzig. 15 p.
- « Levidoj » Tria libro de Moseo. Eld. 1912, ĉe Hachette 71 p.
- « Deklaracio pri Homaranismo. » Eld. 1913 de la gazeto « Homaro » en Madrido 14p.
- « Lingvaj Respondoj (nova serio) ». Eld. 1913 de la Centra Oficejo, Parizo. 33 p.
- « Nombroj. » Kvara libro de Moseo. Eld. 1914, ĉe Hachette. 100p.
- « Readmono. » Kvina libro de Moseo. Eld. 1914, ĉe Hachette. 84p.
- « Rakontoj el la Biblio » Antologio el la Malnova Testamento. Eld. 1921, ĉe Brita Esperantista Asocio. 80p.
- « Post la Granda Milito. » Alvoko al la diplomatoj. Eld. 1922 de A. Paolet. 16p.
- « Fabeloj de Andersen, unua parto. » Eld. 1923 ĉe la Centra Librejo en Parizo. 152 p.
- « La Rabeno de Baharah » Novelo de Heine. Eld. 1924, ĉe la Centra Librejo. 67 p.
- « La Gimnazio. » Rakonto de Ŝalom Alejhem. Eld. 1924, ĉe la Centra Librejo. 67 p.
- « Lingvaj Respondoj (plena kolekto) » Eld. 1925, ĉe la Centra Librejo. 77p.
- « Fabeloj de Andersen, dua parto. » Eld. 1926, ĉe la Centra Librejo.
- « Sankta Biblio. » Eld. 1926, ĉe Brita kaj Alilanda Biblia Societo. El ĝi la malnova testamento estas tradukita de D-ro Zamenhof kaj iom ŝanĝita kaj korekta de Esperantista Biblia Komitato.

« Fabeloj de Andersen, tria parto. » en preparo.

(B) GAZETAJ ARTIKOLOJ

- « Pri Preterlaso de Preskorektigo. » Publika seligo. En « La Esperantisto » 1891. (sur p. 15).
- « Pri la Ligo. » Artikolo pri la « Ligo Esperantista, » proponita en la gazeto « Esperantisto. » 1893 (sur p. 4-6.) En « Esperantisto. » 1893 (sur p. 50-54.)
- « Fundamenta Verko. » Projekto pri eldonado de « Granda Vortaro germana-esperanta. » En « Esperantisto » 1893. (p. 66-68).
- « Pri la Reformoj. » « Enkonduka artikolo » (laŭ p. 179) al la ĉisuba artikolo. En « Esperantisto » 1893. (p. 177-179).
- « Pri Reformoj en Esperanto. » Artikoloj publikigitaj en la gazeto « Esperantisto, » 1894. Reeldonita 1907 de D-ro Javal.)
- « Al la Ligo Esperantista. » Artikolo invitanta al voĉdonado. En « Esperantisto, » 1894. (p. 66).
- « Fina Rezultato de la Voĉdonado. » Raporta artikolo. En « Esperantisto, » 1894. (p. 161-162).
- « Pri la Venonta Jaro. » Artikolo. En « Esperantisto 1894. » (p. 145-146).
- « Sciigo pri la Biblioteko. » Raporta artikolo. En « Esperanto. » 1894. (p. 94-95).

NUBETO ŜVEBAS SUPER MI !

Nubeto ŝvebas super mi ;

La suno ne plu brilas ;

Forrestas juna vivradi' ;

Soleco malutilas.

La vivo estas dorna voj' :

La amo ĝin purigas ;

Sed ĝi, al tiu eta ĝoj',

Nenian rozon ligas ;

La edzo mia iris for :

Dancado lin altiras.

Dum tedas min infana plor',

Aliajn li admiras.

Alvenas tiel nokta hor',

Spirito mia revas,

Revidas daŭre en memor'

Junecon, kiu krevas.

Cu tio estas do la am',

Pri kiu oni laŭdas ?

Min malgajigas la deklam' ;

Sed... la junec' aplaŭdas.

Mi aŭdas lin, Ho granda Di' !

Mi eble tro babilis...

Nubeto ŝvebis super mi

Sed suno jam rebrilis.

Juul KARNAS.

GRUPA VIVO.

La "Hobokenaj Esperantistoj" ne dormas !

La 4an de Februaro, oni havis la honoron kaj la plezuron, akcepti en nia mezo la eksterlandan samlingvanon, S^{ro}n Bonespere, kiu estas Hungara maristo.

Tiu samlingvano estis tiel bona, veni por ĉeesti nian duonmonatan kunvenon.

La kunveno komencis je kvarono de la sepa. Ĉeestis multaj membroj, inter kiuj oni eĉ rimarkis subtenantojn, kiuj ankaŭ volis vidi kaj aŭdi alilandan Esperantiston.

Nia prezidanto, S^{ro} J. Van Tiggel, konatigis al la ĉeestantoj S^{ro}n Bonespere, kaj ankaŭ deziris al tiu-ĉi koran bonvenon ! Ĉiuj anoj aplaŭdis la vortojn de la prezidanto.

Post la legado de la raporto pri la pasinta kunveno sekvis preparolado de kelkaj grupaj aferoj. Poste la hungara samlingvano komencis paroladon. Li dankis la grupon por la afableco kaj gaste-meco montritaj al li.

Li senkulpigis rusan samideanon, kiu tute ne povis ĉeesti nian kunvenon pro personaj aferoj. La parolanto rakontis al ni sian maristan vivon, kaj montris ke li ĉie, kien li jam vojaĝis, trovis Esperantistojn, kiuj ĉiuj tuj interamikiĝis !

Por fini la paroladon, S^{ro} Bonespere deziris al nia junega grupo longegan-kaj fruktodonan ekziston !

Orelsurdiganta aplaŭdo sekvis !...

Nia prezidanto tradukis flandralingve la paroladon, por ke la subtenantoj anoj, kiuj ĉeestis la kunvenon, ankaŭ komprenu ĝin. Samtempe li dankis S^{ro}n Bonespere por la belega-kaj interesege parolado. Ni ĉiuj povis jesi la vortojn de nia prezidanto: « Estas homoj, kiuj diras ke la elparolado de la mondhelplingvo ne estas la sama en ĉiuj landoj ! Ni vidas, laŭ la parolado de S^{ro} Bonespere, la ateston ke tiuj personoj estas malpravaj. »

Estis jam la kvarono de la oka !

Dum oni trinkis glason da hiero en la trinkejo, la trinkejestrino preparis la kafofeston.

Je la duono de la oka oni reeniris nian kunvenejon, kiu tute estis ŝanĝita en manĝo-salono! Ĉiuj ĉeestantoj manĝis kaj trinkis, kantis kaj ridegis dum longa tempo. Ĉirkaŭ la naŭa oni formetis la tasojn kaj pladojn, kaj la bierglasoj, pipoj, cigaroj kaj cigaredoj revenis!

Ĉiuj anoj leviĝis kaj la intima kunestado komencis per la kantado de la «*Espero*». La sekretario deklamis poemon, «*Preĝo sub la Verda Standardo*», de la glorinda elpensinto de Esperanto, Dr° Zamenhof. Aliaj membroj ankaŭ deklamis, kantis aŭ rakontis Esperantajn poemojn, kantojn aŭ historiojn.

Dum kelkaj horoj oni ankoraŭ amuziĝis! Nia Hungara vizitanto tute ne restis indiferenta kaj ankaŭ amuziĝis kun ni.

Sed la tempo rapide forflugas, kiam oni sin amuzas. Ĉirkaŭ la dek-unua nia atestimata vizitanto devis foriri. Kontentega pri la akcepto, Sr° Bonespere foriris, dankante la estraron kaj promesante reviziti nian grupon, kun kelkaj el siaj amikoj, kiuj ankaŭ loĝas en Antverpeno.

La anoj de «*Hobokenaj Esperantistoj*» ne ankoraŭ foriris, kaj interlabiladis pri Esperantaj aferoj. Ili eĉ havis la plezuron varbi novan agantan membron! Jam la unua frukto de la vizito de alilandulo!

La kunestado daŭris ĝis la unua nokte!

La «*Hobokenaj Esperantistoj*» do ne dormas?! Kaj ke ili kunigas la utilon kun la agrablo?

L. TOEX.

LA REKTA VOJO.

Monata Programo de la Sabataj kunvenoj

7an de Aprilo: Agrabla kunsido de Sro Karinas.

14an de Aprilo: Sro Jacobs plenigos la vesperon.

21an de Aprilo: Agrabla kunsido de Fino Vander Mast.

28an de Aprilo: Parolado de Sro Roelants.

La Suda Lumo.

Komence de la monato aprilo «*Suda Lumo*» translokigos sian sidejon. Anstataŭ en Centraal Schouwburg, ĉi ĉi grupo kunvenos en la **privataj salonoj** de **Bexstraat, 11** (apud la urba Parko), la 2an kaj la 4an sabaton de ĉiu monato je la 8a vespere. La unuaj kunsidoj en la nova kunvenejo okazos la 14an kaj 28an de aprilo. Ni esperas ke ĉiuj ĉi novaj aranĝoj certe instigos la anojn regule veni al la kunvenoj por tute agrable kaj komforte pasigi la tempon. Vizitantoj estos ĉiam bonvenaj. Oni ne forgesu sonorigi ĉe la pordo, ĉar ĝi ne staras malfermita.

LA ESTRARO.

Ĉu vi jam scias ke ano de A. P. P. K. liveras bonegajn belgajn karbojn?

Demandu prezojn al

S-o J. BOVOY

Minderbroedersrui, 64 Antwerpen

Gesamideanoj! Faru propagandon per la uzado de

ESPERANTISTAJ ADRESKARTOJ

(Kun Verda Stelo)

haveblaj ĉe

H. VAN DER MAST

Vlagstraat, 9

ANTWERPEN (Belgujo)

ENLANDO: po 100 kartoj 12.50 fr.

EKSTERLANDO: 15.— fr.

La sendkostoj estas enkalkulitaj. — — POŝTĈEKO 209852

BULTENO

MONATA DE EL DONO LA

ANTVERPENIA PROPAGANDA POR ESPERANTO KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHÉ STEENWEG 444
4^a JARO

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSTRAAT 51
MAJO 1928

JARA ABONO
UNU NUMERO

BELGUJO : 3.— Bfr.
.. 0.30 Bfr.

EKSTERLANDO 1.25 Svfr.
.. 0.15 Svfr.

La XXa Universala Kongreso.

En la lastaperinta numero de nia oficiala gazeto "Esperanto" (Aprilo) aperis artikolo de H. J. titolita: „Esperantistaj Problemoj. IV La Kongreso.“

H. J. ŝajnas esti spertulo pri kongresoj tial ni volonte represas parton de la inter-esplena artikolo. Mi ne dubas ke la L.K.K. estas leginta ĝin; almenaŭ ĝi povus profiti de la bonegaj konsiloj, kiuj la eminenta artikolo enhavas.

Sed la L. K. de la XXa universala kongreso, kiu opinias esti superpotenca, ne bezonas konsilon de spertuloj nek kunhelpo de la anoj de A.P.P.K.

J. S.

* * *

„Ne ĉiu urbo taŭgas eĉ se ĝi havas la „kvalifikon de „kongresurbo“. Ni devas „atenti jenajn punktojn:

1. Situacio centra. Centra Eŭropo estas „nia kampo idea, kie regas multlingveco. „En centraj landoj ni povas ĉiam kalkuli je „partopreno sufiĉa dume la vojaĝkostoj de „tiuj landoj riĉaj je esperantistoj al eks- „trem-nordo aŭ sudo ne permesas parto- „prenon multnombran. Decidas ankaŭ la „libertempo ofte nur dusemajna;
2. Sufiĉa nombro de esperantistoj en „la loko kiu invitas. Nepra harmonio „inter la lokaj grupoj (se estas „pluraj) (not. de l' redakcio); esperantistoj „kun socia rango por faciligi kontakton kun „aŭtoritatoj, k.t.p.;
3. Kuninvito de la kongreso per loka „organizaĵo aŭ urbeŝtraro aŭ turisma or- „ganizaĵo kun certigo de proporcia kun- „laboro, ekzemple dispono de materialo „por la propagando (afiŝoj, gvidlibroj, dis- „pono de antaŭkongresa oficejo eble ankaŭ „de oficisto esperantista, financa subteno.

ANTWERPEN, KONGRESURBO DE LA XXa

La Loka Kongresa Komitato de la XXa universala kongreso de Esperanto ne juĝis necesa la kunlaboradon de A.P. P.K.

Por organiza komitato tamen decas kapti ĉiujn helpilojn kaj rimedojn por sukcesigi universalan kongreson. La L.K.K. publikigis la kutiman laŭdon pri la kongresurbo, diskonigante al la tutmonda Esperantistaro ĝiajn interesaĵojn,

allogaĵojn kaj vidindaĵojn. Vere Antwerpen estas vidinda kaj vizitinda urbo pro ĝia haveno, ĝiaj artaĵoj, k.t.p.

Sed... L.K.K. ne devas malatenti aŭ forgesi ion, kio povas instingi eksterlandanojn partopreni en la vizito de la kongresurbo. Antwerpen posedas ankaŭ interesaĵon famekonatan, nome la diamantkomercon kaj industrion. Antwerpen estas la plej granda kaj plej grava diamant-



Nº 1. La Pelikaanstrato.

centro en la mondo! Ni, diamantistoj, fieras pro tio, pro la viglaj komercistoj kaj lertaj laboristoj, kiuj realigis tion.

Fremdulo, alvenante en Antwerpenon, promenas laŭlonge la Pelikaanstrata diamantborsaro, restas staranta antaŭ la vitroj de kafejoj, kie ĉe tabloj, negocistoj montras diamantojn, krudajn kaj facetitajn unu al alia. En la sama strato troviĝas kvar oficialaj diamantkomercejoj, enireblaj nur por membroj.

La bildo nº 1 (*) montras



Nº 2. Salono de la Diamantklubo.

la Pelikaanstraton. Ĉirkaŭ kvar mil negocistoj, makleristoj, fabrikantoj kaj juvelistoj sin okupas ĉiutage pri la brilantoj, multvaloraj ŝtonetoj.

N° 2 vidigas unu el la komercejaj salonoj de la "Diamantklubo".

La krudaj, prilaborotaj diamantoj alvenas Belgujon trans la potenca "Londona Sindikato" aŭ senpere el Sud - Afriko, Kongo, Brazilujo kaj Brita Gujano.

Lertaj laboristoj disfendigas la malperfektajn "ŝtonojn" ĝis senmakulaj oktaedroj (natura kristalformo de la diamanto). Aliaj laboristoj (segistoj) "segas" la diamanton. Ambaŭ prilaboradoj okazas laŭbezone.



N° 3. Segejo.

→→→>>><<<<<<<



N° 4. La Senkrudigado.

N° 3 montras "segejon". — Per rapidege turniĝanta, tre maldika, bronza disko, la laboristo segas aŭ pli bone "tranĉas" la ŝtonon en du parton.

N° 4 estas la "senkrudigado". Ĉi tiu laboristo "frotas" unu diamanton kontraŭ alia turniĝanta diamanto ĝis ĝi akiras la necesan, rondan formon de brilanto.

(daŭrigas)

(*) La klisajoj estas aŭtable pruntedonitaj de la Sindikato de fabrikantoj kaj de S-ro I. Lipschutz, ĝia prezidanto.

Verkoj de Zamenhof.

daŭrigo.

„Eltiro el Privata Letero” al Trompeter pri la entrepreno de S-ro Wahren. En "Lingvo Internacia" 1896 (p. 27-29)
„Memstareco.” Artikolo. En

„Lingvo Internacia” 1899. p. 101-103
 „Kalkula Raporto.” Etato. En „Lingvo Internacia” 1899. p. 124-126
 „Pretaj Manuskriptoj.” Artikolo. En „Lingvo Internacia.” 1896. (p. 126)
 „Pri la Biblioteko.” Publika sciigo. En la „Lingvo Internacia” 1896. p. 189.
 „Danko okaze de la dekjara Ekzisto de Esperanto.” gazeta deklaro. En „Lingvo Internacia.” 1897. p. 83.
 „Nekrologo pri Wasniewski.” Artikolo. En „Lingvo Internacia.” 1897. p. 34-35.
 „Listo de Propraj Nomoj en la Jarlibro Esperantista.” En „Jarlibro Esperantista” 1897. p. 37.
 „Raporto pri la Skriba Kongreso.” Artikolo. En „Lingvo Internacia.” 1897. p. 83.
 „Nekrologo pri Trompeter.” Artikolo. En „Lingvo Internacia.” 1901. p. 140.
 „Pri la Mistera Kontrakto.” Artikolo. En „Lingvo Internacia.” 1903. p. 77-80.

Esperanto ĉe la J. M. C. A.

(Asocio de Kristanaj Junuloj).
 Antverpena Sekcio.

Sabaton, 14an de aprilo, la Antverpena sekcio de J. M. C. A. festis la 30an datrevenon de sia starigo. Nia prezidanto, s-ro J. Jacobs estis invitata ĉeesti la feston kaj petata fari mallongan paroladon pri Esperanto. Per kelkaj vortoj li montris la necesecon por tia tutmonda asocio kia estas J. M. C. A. uzi en siaj interrilatoj internacian lingvon. Li ankaŭ faris komparon inter la J. M. C. A. movado kaj tiu de Esperanto; ambaŭ celas plibonigon de la nuna homaro, unu bazante sin sur la biblio, la alia sur lingva interkompreno. La varma aplaudado post la fino de la parolado montris ke la publiko plene interkonsentis kun la paroloj de s-ro Jacobs. Dankante lin la prezidanto de J. M. C. A. promesis atenti la ŝagajn konsilojn pri la uzado de Esperanto.

JOBŬ.

GUPA VIVO.

LA REKTA VOJO.

5a de Majo: Antaulegado de f-ino Keverijn
 12 „ Parolado de s-ro Van Bedaf.
 19 „ Ne kunveno.

26 de Majo: Ne kunveno.

2a de Junio: Vizito al la foiro.

9 „ Gvidado de s-ro Foquet. Estrara kunveno.

16 „ Gvidado de s-ro Karnas. Ludado — Deklamado.

23 „ Disputadvespero.

30 „ Dancadvespero.

Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj.

Komence de la 3a de aprilo A. G. E. D. regule kunvenas ĉiumarde, je la 8a, en Plantijnlei 66-68. La celo de la kunvenoj dum la venonta sezono estas precipe ekzerci la anojn en la praktika uzado de la lingvo por ke ili kapablu bone klarigi al a eksterlandaj samideanoj, kiuj vizitas la XXan, ĉion necesan pri la interesege diamantindustrio. Kvankam la kunvenoj estas jam ŝufiĉe multnombre vizitataj ni tamen faras varman alvokon al ĉiuj esperantistoj-diamantistoj regule ĉeesti la tre interesajn kunvenojn.

A. G. E. D.

Kie renkontiĝas la Antverpenaj Esperantistoj ?

A. P. P. K. La 1an kaj 3an jaŭdon de la monato, je la 8a, en kafejo „ARTES”, Statieplein.

Suda Lumo. La 2an kaj 4an sabaton de la monato, je la 8a, en Bexstraat, 11 (J. M. C. A.).

La Rekta Vojo. Ĉiusabate, je la 8a, en „HOTEL CECIL”, Van Arteveldestr. 8

Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj. Ĉiumarde, je la 8a, en Plantijnlei, 66-68.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj. Vidu „SUDA LUMO”.

Ĉu vi jam scias ke ano de A. P. P. K. liveras bonegajn belgajn karbojn?

Demandu prezojn al

J. BOVOY

Minderbroedersrui, 64 Antwerpen

BULTENO

MONATA DE EL DONO LA

ANTVERPENIA PROPAGANDA E ESPERANTO KOMITATO

REDAKTEJO: ^{Ben. 404}
BOOMSCHE STEENWEG 444

4^a JARO

N^o 6

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSTRAAT 51

JUNIO 1928

JARA ABONO

BELGUJO : 3.— Bfr.

EKSTERLANDO 1.25 Svfr.

UNU NUMERO

„ 0.30 Bfr.

„ 0.15 Svfr.

Neceso de la ripetado.

Ni jam havis la okazon montri la senvalorcon de la instruado de esperanto en 10-15 lecionoj. Ke tia sistemo tute ne taugas montras la sekvanta artikolo de s^{ro} P. Ernits instruisto, el Estonujo, aperinta en Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio n-o 75. « Oni ne povas silente preteriri la demandon pri la ripetado de la estintaj lecionoj. Multaj lernantoj kaj kursanoj havas ege malfortan memorkapablon. Ĉion ili ekposedas malfacile. Nur lerta ripetado, aplikata de la instruanto ĝustatempe kaj celkonforme povas definitive komprenigi kaj memorfiksi la pasintajn lecionojn. Jam la antikvuloj diradis : «La ripetado estas la patrino de la sciado».

Le ripetado ne nur estas «la patrino» de la sciado, sed ankaŭ «la patrino» de la komprenado. Oni tralegu ian malfacile komprenoblan verkon. Ne konsternigante pro ĝia malfacileco, oni tamen finlegu. Post

kelka tempo oni relegu ĝin - la verko estos jam pli komprenebla. Preterpasinte du tri monatojn, oni denove tralegu ĝin. Kaj oni mirigite konstatos, ke la verko igis klara - estinte antaŭe malluma. Mondfama profesoro de filozofio konfesis, ke li definitive estas kompreninta la «Etikon» de Spinoza nur post sepfoja tralego. Profesoro Gogacki estas dirinta, ke li perfekte komprenis la filozofion de Hegel nur post tridekjara studado de liaj verkoj. Kaj tio ne estas mirinda, ĉar ĝenerale la profundpensaj kreaĵoj de mondfamaj verkistoj estas rezultatoj de longdaŭra pripensado.» La artikolo montras ke A.P.P.K. estis tute prava rekomendante al la urbestro de Antwerpen ke plena esperanto kurso devas daŭri almenaŭ 200 horojn. Nur tiamaniere la profesoroj havas la tempon por ofte ripetadi tion kion ili instruis kaj por doni al la lernantoj la necesan akazon por aplikati la gramatikajn regulojn.

A. P. P. K.

ANTWERPEN, KONGRESURBO DE LA XVa

(daŭrigo)

Post tiu ĉi antaŭ-prilaborado la brilianto venas en la manojn de la facetisto, kiu donas 58 facetoj, vivon kaj brilegan lumon al la senviva mineralaĵo (vidu nº 5) kaj la perfekta „brilianto” nº 6.



Nº 6. Perfekta Brilianto.

La facetado okazas sur rapide turniĝantaj, feraj diskoj. En proksimume 150 metiejoj, grandaj kaj malgrandaj, pli ol 10.000 (dek mil) Antverpenaj diamantlaboristoj produktas briliantojn kaj aliformajn diamantojn.

Se oni scias ke en 1927 Belgujo eksportis nur al Usono 197.024 karatojn da facetitaj diamantoj, valorantaj 15.972.533 Am. dolarojn; oni povas iom imagi kio signifas Antwerpen kiel diamantcentro.

La sindikato de diamantlaboristoj, kalkul-


ante 14.000 anojn, agas kune kun tiu de la fabrikantoj (500 membroj) por reguligi la salajrajn tarifojn por laboristoj kaj por subteni la stareblecon de la landa komerco.



Nº 5. Facetejo.

Nº 7 estas malgranda ekspozicio de krudaj kaj facetitaj diamantoj. Rimarku ankaŭ pesilon, ŝovelilon kaj lupeon.

Sendube la espereble multnombra partoprenantaro en la kongreso ne malatentos ĉi tiun interesajn Antverpenan, kiu viv-



Nº 7. Ekspozicio de krudaj kaj facetitaj diamantoj.

igas okdek mil enloĝantojn aŭ kvinonon de la urba loĝantaro.

JOS. SWALF

La oficialaj Kursoj.

Dum la monato Majo okazis la fina ekzameno de la urbaj superaj kursoj de Esperanto.

La juĝantaro, komisiita de la kolegio de la urbestro kaj skabenoj, konsistis el : S-ro A. Verschueren, urba ĉefinspektoro de la instruado, prezidanto.

S-ro H. Michiels, kantona inspektoro de la instruado, ano.

F-ino B. Geers, anino.

S-ro J. Vereeck, profesoro, ano.

S-ro J. Karnas, profesoro, ano.

La juĝantaro aljuĝis la diplomon de plena studado de Esperanto kaj kapableco pri komerca korespondado al :

S-roj J. Calis, M. Engel, F-inoj L. Goossens, L. Joukes, M. Lodema, S-roj A. Meire, Fr. Senecaut, A. Simons, H. Van Doninck, H. Van Houdt, Fr. Wiesé.

A.P.P.K. sincere gratulas la novajn diplomitojn !

Sub la titolo **"La Bulgara Reakcio laborante. - La Batalo por generala Amnestio. - La landestraro trafas la esperantistojn"** ni legas en „Volksgazet”.

..... Disiginte la unuigo de la anti-alkoholaj studentoj, la ministro de publika instruado malpermesis la esperantistajn organizaciojn de studentoj. Li deklaras ke la lernado de esperanto estas kontraŭpatruja ago, ĉar, diras la ministro : « Esperanto igas rimedo por disvastigi la internacianismon, same kiel la malŝaton de la nacia lingvo ».

Tial la ministro decidas :

„Ĉiuj kursoj de Esperanto organizitaj, en la lernejoj, devas ĉesi, kaj la unuigo de esperantistaj grupoj devas disigi. La lernejestroj devas malpermesi al la lernantoj ricevi publikajojn en Esperanto”. Tiu ĉi decido denove pravas, kaj tre trafe,

kiom malliberala estas la reakcio de la bulgara landestraro.

(Trad. el la flandra lingvo)

La Dürerjaro Nürnberg 1928

La 6an de aprilo 1928 estos la 400-jara datreveno de l'morto de unu el la plej grandaj artistoj de ĉiuj tempoj, de la pentristo Albrecht Dürer. La urbo Nürnberg festas la memoron al unu el siaj plej famaj filoj per serio de imponaj aranĝoj. Ĝi realigas de aprilo ĝis septembro la „Dürerjaron Nürnberg 1928”.

La ĉefpunkto de la aranĝoj estos unika, ankoraŭ neniam prezentita ekspozicio de originalverkoj de Dürer. La kolektado de desegnoj, bildoj, gravuraĵoj ktp. el ĉiuj kulturlandoj de la mondo estis kompreneble malfacila tasko, pri kiu cetere oni jam nun povas diri, ke ĝi estos komplete solvita. La klopodoj de la urbestro renkontas preskaŭ ĉie aprobon, tiel ke la ekspozicio de la originalaj verkoj de Dürer en la festĉambregoj de la Germana Nacia Muzeo en Nürnberg unuigos kredible mil kreaĵojn de la artisto kaj speciale liajn plej gravajn verkojn. La galerio enhavos ankaŭ verkojn, pri kiuj oni ne certe scias, ĉu ili estas laboraĵoj de Dürer, tiel ke ankaŭ la arthistoria esploro gajnos en diversa maniero instigojn el la vizito de la ekspozicio.

La esenca punkto de la prezentaĵoj estas kadrumita de granda ekspozicio de germana arto, plue de kolekto de elektitaj trezoroj el la riĉa kulturposedaĵo de la Nürnberga urbarĥivo kaj de la Nürnberga urba biblioteko. Krome estas intencataj serioj de paroladoj, festprezentaĵoj en la urba teatro. Hans-Sachs-teatraĵoj, popularaj prezentaĵoj sur publikaj placoj (dancoj de la gildoj kaj de submajstroj ktp.), fine specialaj prezentaĵoj pri la popolvivo kaj la kulturposedaĵoj de diversaj germanaj triboj kaj regionoj.

La aranĝoj de la Dürer-jaro altiros grandan nombron da vizitantoj al Nürnberg, kiu por si mem ja estas unu el la plej interesaj, antikvaj kaj romantikaj urboj de Eŭropo. Nürnberg estas riĉa je mond-

famaj arĥitekturaj kaj unikaj arttrezoroj, je intimaj artistaj valorajoj, kiuj estas alireblaj por ĉiuj vizitantoj de Nürnberg. La proksima «Franka Svisujo» prezentas belegajn naturbelajaĵojn, bonegaj estas fine ankaŭ la interkomunikaĵoj per fervojoj kaj aviadilo al ĉiuj direktoj, speciale al la Alpoj kaj la sudo.

Al la esperantistoj Nürnberg estas bone konata pro la XVa Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 1923. La ĉarmo de la antikva kaj gastema urbo kun siaj muroj, turoj, turetoj, muzeoj kaj pitoreskaj parkoj kaj domoj faris grandan impreson al la tri mil partoprenintoj el la tuta mondo. La Nürnbergaj esperantistoj ĝojus, renkonti dum la somero multajn samideanojn, por montri al ili la belajaĵojn de la urbo kaj la aranĝoj de la Dürer-jaro.

Pro informoj oni sin turnu al S-ro Otto Pilhofer, Nürnberg 19, Germanujo, al kiu oni sendu ankaŭ tradukojn el la naciilingva gazetaro.

Verkoj de Zamenhof.

(daŭrigo)

„Pri la Novaj Vortoj de la Germana Vortaro.“ Gazeta respondo al la kapitano Capé. En „Lingvo Internacia.“ 1904 p. 336-339.

„Rimarkigoj pri „Virineto de l' Maro.““ En „Lingvo Internacia.“ 1905 p. 118.

„Pri la Kongreso.“ Artikolo pri la okazonta bulonja kongreso. En „Lingvo Internacia“ p. 275-278.

„Projekto de Regularo de Tutmonda Ligo Esperantista.“ Projekto kiun Zamenhof intencis prezenti al la bulonja kongreso. En „Lingvo Internacia.“ 1905. p. 295-301

Letero al S-ro A. Michaux pri „Tutmonda Ligo Esperantista.“ Antaŭparolo al la ĉi-supra artikolo. En „Esperanto.“ eldonita de Lambert, n-ro 3-4, 1905.

„Deklaracio pri Esperantismo“ (la projekto) 1905. En „Dokumentoj de Esperanto.“ de D-ro Möbusz, eld. 1921.

„Publika Danko“ al Michaux kaj aliaj.

En „Lingvo Internacia.“ 1905. p. 421.
„Projekto de Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo.“ (la antaŭparolo al la „Deklaracio pri Esperantismo“) En „Boulet, Kongresa Libro.“ 1905. p. 81-82.
(daŭrigas)

NASKIĜOJ.

La 27an de Aprilo naskiĝis al gesinsoroj J. Karnas-Verhoeven, fileto Henck. Al la simpatia prezidanto de «La Rekta Vojo» kaj al lia estimata edzino A.P.P.K. esprimas siajn gratulojn kaj plej korajn bondezirojn.

Al gesinjoroj Van Kerkhoven naskiĝis fileto, nomita Dirk. Niajn sincerajn gratulojn.

EDZIĜO.

Kun plezuro ni eksciis la edziĝon de S-ro J. Foquet ano de L. R. V. kun F-ino Brugmans. Al la juna paro A.P.P.K. esprimas siajn plej korajn dezirojn por longdaŭra feliĉa kunvivado.

Kie renkontiĝas la Antverpenaj Esperantistoj ?

A. P. P. K. La 1an kaj 3an jaŭdon de la monato, je la 8a, en kafejo „ARTES“, Statieplein.

Suda Lumo. La 2an kaj 4an sabaton de la monato, je la 8a, en Bexstraat, 11 (J. M. C. A.).

La Rekta Vojo. Ĉiusembe, je la 8a, en „HOTEL CECIL“, Van Arteveldestr. 8

Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj. Ĉiumarde, je la 8a, en Plantijnlei. 66-68.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj. Vidu „SUDA LUMO“.

Ĉu vi jam scias ke ano de A. P. P. K. liveras bonegajn belgajn karbojn ?

Demandu prezojn al

J. BOVOY

Minderbroedersrui, 64 Antwerpen

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPEN
PROPAGANDA
POR ESPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO: ^{Ben. K. P. K.}
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDER 55 TRAAAT 51

4a JARO

N^o 7

Julio 1928

JARA ABONO
UNU NUMERO

BELGUJO : 3.— Bfr.
„ 0.30 Bfr.

EKSTERLANDO : 1.25 Svfr.
„ 0.15 Svfr.

Koran bonvenon al ĉiuj gesamideanoj !

A. P. P. K. havas la honoron peti ĉiujn gesamideanojn ĉeesti la feston kiun ĝi organizas, okaze de la disdono de la oficiala diplomo al la lernantoj de la urbaj vesperkursoj de Esperanto, vendredon, 10an de aŭgusto, je la 8 1/2 vespere, en la salonego de „Centraal Schouwburg,” Van Wesenbkestrato, 10 (apud la Centra Stacidomo.)

Eniro senpaga ! Ĉiuj estas benvenaj.

A.P.P.K.

Gesamideanoj !

Ĉu la esperanto movado interesas vin ?

Ĉu vi deziras koni la veran situacion ?

Ĉu vi volas helpi al la plibonigo de la esperanto movado ?

Nepre ĉeestu la publikan ĝeneralan kunvenon de la esperantistoj en la salonego de „Centraal Schouwburg”. Van Wesenbkestrato, 10 (proksime de la Centra

Stacidomo), sabato, 4an de aŭgusto, je la 3a posttagmezo.

Tre gravaj punktoj estas priparolotaj.

Internacia Komitato.

A. P. P. K. kaj la XXa universala kongreso de Esp.

Por helpi al la sukceso de la XXa kaj por agrabligi la restadon de la gesamideanoj en Antwerpen, A. P. P. K. faris la jenajn aranĝojn.

Ni organizis en la centro de la urbo, en por la esperantistoj rezervita salono de la plej moderna kaj komforta kafejo de la urbo „Artes” Statieplein, 2, (Stacioplaco, kontraŭ la enirejo de la Centra Stacidomo) renkontejon-informejon. Ĝi estas malfermita la tutan tagon de post la 9a matene kaj senpage alirebla por ĉiuj gesamideano. Lokaj esperantistoj deĵoras la tutan tagon kaj volonte donas ĉiajn informojn.

Unuaranga orkestro je tagmezo kaj vespere.

Je simpla antaŭsciigo de almenaŭ 3 horoj ni povas senpage aranĝi pli grandan kunvenejon por kunsidoj de grupo da esperantistoj en

„Centraal Schouwburg” (Centra Teatro) Van Wesenbekestrato, 10, (malantaŭ „Artes”).

* * *

Krom tio A. P. P. K. projektis gvidatajn vizitojn al vidindaĵoj kaj promenadojn.

N. B. La montrata horo estas la horo de la foriro, La kunvenloko estas ĉiam sur la Stacidomo, antaŭ la enirejo de la Centra Stacidomo, apud la haltejo de aŭtobusoj; en okazo de pluvo oni kunvenas en la granda halo de la Stacidomo. **SABATON**, 4an de aŭgusto je la 14a kun speciala permeso de la posedanto vizito al la muzeo „La Ora Sprono” (fama privata muzeo de antikvaĵoj kaj folkloro).

DIMANCON, 5an de aŭgusto je la 14.30a h. Vizito al la muzeo de Belaj Artoj kaj de la muzeo Plantijn (2 grupoj).

Post tiu vizito, en okazo de bela vetero, oni veturos per tramveturilo al la belega parko „Nachtegalenpark”, sekcio „Middelheim”. Tie oni povas ripozi, ludi, havi teon aŭ kafon, k.t.p. t.e. agrable pasigi la vesperon. Ankaŭ ne partoprenintoj en la vizitoj ni invitas veni al „Middelheim” je la 18a h.

LUNDON, la 6an de aŭgusto je la 9.30 h. Vizito al la malnova urbo.

Je la 20a h. Veturado al la maldekstra bordo de la riverego, por de tie aŭdi la sonorilarkoncerton de la Ĉefpreĝejo.

MARDON, la 7a de aŭgusto je la 14a h. Vizito al diamantmetiejoj.

MERKREDON, la 8a de aŭgusto je la 8.30 h. (Precipe por la ĝeinstruistoj) Vizito de la unua liberaera lernejo „Diesterweg” de Heide. (Ĉar Heide estas je 22 Km. de Antwerpen, oni veturas per vagonaro, kiu forlasas Centran Stacidomon je 8.58. Oni ree estos en la urbo je la 14.12a h.) Prezo de la bileto proksimume 9.—fr.

Je la 19.30a b. Ĉeesto de la koncerto en Groenplaats (Verda Placo).

Je la 20a. Kunveno por sennaciistoj, SATanoj kaj laboristoj en „Achtrenhuis”, Carnotstr., 112, organizita de „Nia Ideo”, socialista esperantogrupo (loka S.A.T.-grupo).

JAUDON, la 9an de aŭgusto je la 9a h. Vizito de la haveninstalajoj.

VENDREDON, la 10an de aŭgusto je la 20a h. Festo, organizita de A.P.P.K., okaze de la oficiala disdono de la diplomoj de la Urbaj Vesper-

kursoj de Esperanto, en „Centraal Schouwburg”, Van Wesenbekestrato, 10.

Senpaga eniro.

Neniu Ĉefulo en Esperantujo

Semajnojn kaj semajnojn la tuta mondo direktis la okulojn al la Nordo-ĉiujel ni scias la dramon, kiu okazis en tiuj malvarmegaj kaj malgastemaj regionoj ĉirkaŭ la norda poluso kaj neniu ne sentis kompaton por tiuj malfeliĉuloj, kiuj, flosante sur pecego da glacio, vane atendis la helpon kaj savon, kiujn aliaj herooj tiom volonte volis realigi. Kaj kiam la unuaj favoraj komunikoj pri la forlasitaj viroj atingis nian komfortan domon, nia koro plengeĝiĝis kaj nia espero por ilia savo ne estis malpli malgranda ol tiu de la savotoj.

Sed kvankam kompatato plenigas nian koron por tiuj, kiuj travivis jam tiom da mizeraj horoj, nia menso serĉas la kialon-la kaŭzon.

Kaj jen-pli kaj pli pruviĝas, ke Generalo Nobile, la estro de la ekspedicio, perdis sian belan „Italia'n”, ĉar li perdis la prudenton jam pli frue; li, la juna, ĉarma, eble talenthava kaj certe ne malkuraĝa viro, perdis la prudenton, estante tro malforta por porti la laŭdon kaj aplaŭdon de la homoj-certe, li estas kulpa-sed ne nur li; ĉar ankaŭ tiuj, kiuj honorigis lin kiel heroon antaŭ ol li estis vera heroo, same kulpas.

Nobile kondukis sian ŝipanaron al la mortigaj glaciaj regionoj de la plej norda parto de la mondo, ne sufiĉe respektante la vivon kaj bonfarton de siaj subuloj kaj kunuloj, nur rigardante al ebla famo.

Sed ankaŭ ni, Esperantistoj, ĉiuj fariĝinte ŝipanoj de la „privatia” eble kontraŭ nia volo kaj certe sen nia antaŭscio, estas kondukataj al regionoj, kien ni neniam irus propravole.

Ankaŭ al ni minacas malvarmo frosti la koron, ĉar la iama fajro, kiu varmigiĝis niajn sentojn pli kaj pli estas estingata per la „nobila” maniero, je kiu ni estas kondukataj al regionoj nekonataj.

Kaj li, al kiu decisi esti nur nia gvidanto, li estigis sin la plej superan potencon, subplandigante la tutan regataron, kompleze ridetante al ĝiaj reprezentantoj, - bonvole malsuprenirante unu-du ŝtupojn de sia alta trono por renkonteniri tiujn, kiuj avide ensorbis liajn afablaĵojn kiel reĝajn favorojn, - palpebrumante post sia tablo

Gokongresanoj, konatiĝu kun la arttrezoroj kaj la haveno de Antwerpen.

ANTWERPEN, KONGRESURBO DE LA XXa

La Loka Kongresa Komitato de la XXa universala kongreso de Esperanto ne juĝis necesa la kunlaboradon de A.P. P.K.

Por organiza komitato tamen decas kapti ĉiujn helpilojn kaj rimedojn por sukcesigi universalan kongreson. La L.K.K. publikigis la kutiman laŭdon pri la kongresurbo, diskonigante al la tutmonda Esperantistaro ĝiajn interesajn,

allogaĵojn kaj vidindaĵojn. Vere Antwerpen estas vidinda kaj vizitinda urbo pro ĝia haveno, ĝiaj artaĵoj, k.t.p.

Sed... L.K.K. ne devas malatenti aŭ forgesi ion, kio povas instingi eksterlandanojn partopreni en la vizito de la kongresurbo. Antwerpen posedas ankaŭ interesajn famekonatan, nome la diamantkomercon kaj industrion. Antwerpen estas la plej granda kaj plej grava diamant-




Nº 1. La Pelikaanstrato.

centro en la mondo! Ni, diamantistoj, fieras pro tio, pro la viglaj komercistoj kaj lertaj laboristoj, kiuj realigis tion.

Fremdulo, alvenante en Antwerpenon, promenadas laŭlonge la Pelikaanstrata diamantborsaro, restas staranta antaŭ la vitroj de kafejoj, kie ĉe tabloj, negocistoj montras diamantojn, krudajn kaj facetitajn unu al alia. En la sama strato troviĝas kvar oficialaj diamantkomercejoj, enireblaj nur por membroj.

La bildo nº 1 (*) montras



Nº 2. Salono de la Diamantklubo.

la Pelikaanstraton. Ĉirkaŭ kvar mil negocistoj, makleristoj, fabrikantoj kaj juvelistoj sin okupas ĉiutage pri la brilantoj, multvaloraj ŝtonetoj.

N^o 2 vidigas unu el la komercejaj salonoj de la "Diamantklubo".

La krudaj, prilaborotaj diamantoj alvenas Belgion trans la potenca "Londona Sindikato" aŭ senpere el Sud-Afriko, Kongo, Brazilujo kaj Brita Gujano.

Lertaj laboristoj disfendigas la malperfektajn "ŝtonojn" ĝis senmakulaj oktaedroj (natura kristalformo de la diamanto). Aliaj laboristoj (segistoj) "segas" la diamanton. Ambaŭ prilaboradoj okazas laŭbezone.

N^o 3 montras "segejon". — Per rapidege turniĝanta, tre maldika, bronza disko, la laboristo segas aŭ pli bone "tranĉas" la ŝtonon en du partojn.




N^o 3. Segejo.

N^o 4 estas la "senkrudigado". Ĉi tiu laboristo "frotas" unu diamanton kontraŭ alia turniĝanta diamanto ĝis ĝi akiras la necesan, rondan formon de brilanto.

Post tiu ĉi antaŭ-prilaborado la brilanto venas en la manoj de la facetisto, kiu donas 58 facetoj, vivon kaj brilegan lumon al la senviva mineralaĵo (vidu n^o 5) kaj la perfekta „brilanto“ n^o 6



N^o 4. La Senkrudigado.



N^o 6. Perfekta Brilanto

La facetado okazas sur rapide turniĝantaj, feraj diskoj. En proksimume 150 metiejoj, grandaj kaj malgrandaj, pli ol 10.000 (dek mil) Antverpenaj diamantlaboristoj produktas brilantojn kaj aliformajn diamantojn.

Se oni scias ke en 1927 Belujo eksportis nur al Usono 197.024 karatojn da facetitaj diamantoj, valorantaj 15.972.533 Am. dolarojn; oni povas iom imagi kio signifas Antwerpen kiel diamantcentro.

La sindikato de diamantlaboristoj, kalkulante 14.000 anojn, agas kune kun tiu de la fabrikantoj (500 membroj) por reguligi la salajrajn tarifojn por laboristoj kaj por subteni la stareblecon de la landa komerco.

N^o 7 estas malgranda ekspozicio de krudaj kaj facetitaj diamantoj. Rimarku ankaŭ pesilon, ŝovelilon kaj lupeon.

Sendube la espereble multnombra partoprenantaro en la kongreso ne malatentos ĉi tiun interesajn Antwerpenan, kiu viv-




N^o 5. Facetejo.

igas okdek mil enloĝantojn aŭ kvinonon de la urba loĝantaro.

JOS. SWALF

(*) La kliŝaĵoj estas afable pruntedonitaj de la Sindikato de fabrikantoj kaj de S-ro I. Lipschutz, ĝia prezidanto.



N^o 7. Ekspozicio de krudaj kaj facetitaj diamantoj.



ANTWERPEN

La Metropolo de la Flandra Arto.

Antwerpen havas gloran historion kaj precipe la historio de la belartoj donas al la urbo ĝian plej grandan famon. Quinten Matsijs, Rubens, Van Dijck, Jordaens, Teniers, Quellin, Appelmans, H. Leys, Th. Verstraete, Hendrik Conscience, Peter Benoit, kaj multaj artpentristoj, arhitektoj, verkistoj, kaj komponistoj naskiĝis aŭ laboris en Antwerpen. Ĝiaj muzeoj kaj bibliotekoj estas plenaj je iliaj verkoj kaj iliaj monumentoj, konstruaĵoj belegaj statuoj ornamas ĝiajn stratojn.

Se oni veturas de la centra Stacidomo laŭ la Meir, Groenplaats, Groot Markt kaj la Haveno, trapasante la malnovan urbon ĝis la suda kvartalo, kaj revenante laŭ la larĝaj bulvaroj, la turisto vidas: la Borsion, la Katedralon, la Urbdomon, kaj la Gildodomojn, la malnovan fortikiĝitan kastelon Steen, la malnovan domon de la Buĉistoj, la Plantijn-Moretus Muzeon, la Muzeon de belartoj, la Juĝejon, la Reĝan Flandran Operejon, la Reĝan Flandran Teatron, la Reĝan Ateneon. Estas preskaŭ neniuj publika placo aŭ publika ĝardeno kiun ne ornamas unu aŭ pli da monumentoj aŭ statuoj. Inter la monumentoj la plej menciindaj estas La Liberigo de la Schelde, de la Franca Furio, de la Kongo-Kolonio, de Samson kaj la Leono. La Statuoj de Rubens, de Quinten Matsijs kaj de Leopoldo la oni kalkulas inter la majstroverkoj de la belga skulptarto. La muzeoj kaj preĝejoj enhavas grandan nombron da majstroverkoj de neestimebla valoro, ne nur de la belgaj skoloj de pentristoj kaj skulptistoj, sed ankaŭ verkoj de fremdaj majstroj.

Post la plezurigo de la okuloj per ĉiuj tiuj arttrezoro kaj por ripozigi la spiriton, estas konsilinde viziti la Parkon, kiu ne estas tre granda sed tre pentrinda, la Nachtegaal-Parkon, ne nur grandega sed ankaŭ belega, la Rivierenhof aŭ la Te Boulevard-Parkon. Ekskurso sur la Schelde estas ankaŭ rekomendinda. Oni povas traveturi la riveregon, kaj de la kontraŭa flanko oni havos plej imponan vidaĵon de la haveno, kaj de la urbo. Kaj por kronadi ĉion, oni povas supreniri la turegon de la Katedralo, de kies supraĵo la turisto povas admiri vastan kaj belegan vidaĵon de la grandega urbo, la flandrajn ebenaĵojn, la larĝan kaj fortan Schelde, la mirigan panoramon, kies centro estas la turo de la katedralo.

N. B. Laŭ flugfolio eldonita de la Oficiala Urba Informejo kun la kunhelpo de A.P.P.K.

ANTWERPEN

La Metropolo de la Komerco.

Antwerpen estas fama ne nur pro siaj belartoj, sed ĝi havas ankaŭ bonegan reputacion kiel moderna urbo, rilate la progreson de la mondo, kaj okupas lokon inter la plej unuaj marhavenoj el la mondo. Neniu alia marhaveno estas samtempe tiel bone protektata, kaj tiel proksime de la maro, ne pli vaste kaj pratike organizata kaj ekipata. Estas 5.500 m. da kajoj laŭlonge de la riverego, kun ĉiuj necesaj instalaĵoj kaj vastaj ŝedoj. La profundeco de la akvo je malalta tajdo estas 26 ĝis 32 futoj, kaj de 40 ĝis 46 futoj, kiam estas alta tajdo. La dokoj havas longecon por albordego de 25 km. kaj la profundeco estas de 26 ĝis 36 futoj. Tial la plej grandaj transatlantikaj vaporŝipoj povas enveturi la havenon, kaj ŝargiĝi aŭ malŝargiĝi senpere laŭlonge de la kajoj. Ĉiuj laboroj estas simpligataj per la plej modernaj instalaĵoj. La ŝedoj kovras aeron de 70 Ha. : estas 281 hidraulikaj, kaj 155 elektraj leviloj, kiuj ĉiuj havas forton de 1500 ĝis 3500 Kg. ; estas ankaŭ leviloj de 5, 10, 30, 40, kaj 50 toneloj, kaj granda levmaŝino de 120 toneloj. La instalaĵoj de la dokoj kalkulas diversajn flosantojn levilegojn (unu de 150 toneloj) kaj 16 elevatorojn por grenoj ; per ĉiu el la lastnometaj oni kapablas malŝargi 180 tonelojn po horo. Por la riparado de la ŝipoj ekzistas 7 sekaj dokoj, el kiu unu estas longa 221 m. kaj larĝa 26 m. Fervojararo longa de 400 Km. kuŝas laŭlonge de tiuj instalaĵoj ; ĝiaj stacioj okupas aeron de ĉirkaŭ 200 Ha. ; ili povas havi 12.000 vagonojn sur la vojoj sen malhelpi la trafikon.

Ĉiuj tiuj ĉi vastaj instalaĵoj kiuj ebligas jaran trafikon de proksimume 20 milionoj da toneloj ne plu sufiĉas. Sekve gravaj laboroj komenciĝis, kiuj finiĝos post tri jaroj, kaj ĉar ili devas duobligi la instalaĵojn kaj la laborpovon de la nun ekzistantaj. Antwerpen fariĝos la plej granda marhaveno el la mondo.

Por ĝeneralaj skribaj informoj, libretoj kaj planoj de la urbo kaj de la haveno, oni turnu sin al la Urba Propaganda Informservo. Buŝajn informojn, ankaŭ libretojn kaj planojn oni ricevas en la Urba Informejo en la Centra Stacidomo (dekstre de la ĉefenirejo).

al tiuj, kiuj estas liaj plej fidelaj servantoj- -jen kondukas la juna plej altranga servanto de nia afero, forgesante, ke li, elektite kiel gvidanto de la U.E.A. antaŭ ĉio devas esti la unua servanto de ĝi.

Ĉu vere, karaj samideanoj, ni lasu nin pli longe estri je maniero, kiu estas kontraŭ niaj sentoj? Ĉu ni daŭrigu indulgi agojn, kiujn ni neniam povos aprobi? Ĉu ni toleros ankoraŭ, ke en Esperantujo regadu ĉefuloj, kiuj sin mem elektas? Ĉu unu el ni povos subteni reĝimon, kies sekvo estos la perdo de multaj plej valoraj kunbatalantoj por nia afero?

Ĉu ni konsentu, ke unu persono okupas tri aŭ pli da postenoj, kiuj estas aŭ almenaŭ devas esti responda la unu al la alia?

Ĉu la Prezidanto de la U.E.A., kiu devas esti responda al la Prezidanto de la I.C. Komitato, pli lange povos resti la sama persono?

Ĉu la Gvidanto de „Esperanto”, kiu devas esti responda al la Prezidanto de la U.E.A. kaj tiu de la I.C.K. ankaŭ daŭrigu esti la sama persono?

Ĉu la Reprezentanto de la Nacia Societo (ekzemple Nederlando) samtempe povas esti Komitatano de la U.E.A.?

Ĉu la Prezidanto de la Konstanta Reprezentaro samtempe povas esti Komitatano de la U.E.A.?

Ĉu la senĉesa malpliigo de membroj de la U.E.A. ne jam diris al ni, ke „io estas putra en la Ŝtato Esperantuja?”

Ĉu ni povos daŭrigi ŝtopi la truojn en la monkasoj, dum la „ĉefuloj” nek sufiĉe specifikas la kalkulon nek faras sian eblon malhelpi novajn truojn?

Ĉu „Esperanto” estas sufiĉe bone gvidata, dum ke ni pagas pli ol sufiĉan salajron al la Redaktoro (mi opinias, „dum ke la Redaktoro sin pagigas mem!!)

Ĉu la ne-enpresigo de oficialaj decidoj de la Lingva Esp. Akademio estas laŭ via plaĉo kaj ĉu via sento pri justeco estas kontentigata per tia ago?

Ĉu tiu komedia afero en Genevo restadu?

Ĉu ni lasu malprosperigi la U.E.A. per Registaro, pagata de ni sed ne ŝatata de ni?

Fine - ĉu ni sekvu la Nobilo'n de Esperantujo ĝis kiam la lastaj rimedoj manku por subteni la vivon aŭ ĉu ni penos trovi nian vojon mem al la celo laŭ la volo de la plimulto?

Komprenu ni bone - U.E.A. kaj ĝia nuna estro ne estas la tuta Esperanto-Movado, kiom ajn volonte ĝi pretendas tion; - la malpli grandaj ĉefuloj ĉiu samideano plej bone povos juĝi por kaj pri sia propra lando, kiu meritas tiun nomon, kaj tial mi nur nomas por Holando, la familion Isbrücker. Ne estas la tuta Esperanto-Movado en sia lando, kiom ajn ili tion supozigas interne kaj ekstere de la movado; - ne - ĉiu povas nur esti ero de la tutaj; la unu kompreneble iom pli grava ol la alia, sed - -ero, ero, ero, - - kaj nenio pli.

Kaj nun, karaj geamikoj, kvankam ni ĉiuj ŝatas, ke Internacia Kongreso de Esperanto estu festo, eĉ granda festo-ni ne ĉiam povas nur festi.

Je tiu ĉi Kongreso unue estu pritraktataj la aferoj, kiuj malplaĉas ni ĉiuj; ni penu trovi la ĝustan vojon por eviti tiujn aferojn, post kiam ni unue estu forigintaj ilin.

Kaj ĉar la praktiko jam instruis al ni, ke vere seriozaj aferoj ial facile estas pritrakteblaj dum la Oficialaj Kunsidoj de la U.E.A., ni evitu esti haltigitaj en nia laboro. Tial do ni kunvenu, ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la vera progreso de Esperanto, en la salono de Centraal Schouwburg, Van Wesenbkestrato, 10, (kontraŭ la enirejo de la Centra Stacidomo en Stacia Placo).

La Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato bonvolis aranĝi por ni la aferon tiel, ke ni povos kunveni trankvile por kiom eble plej objektivite priparoli la tutan aferon.

Jam formiĝis komitato provizora sub la Prezido de Sinjoro George Delanoue, la ĉefdelegito de U.E.A. por Francujo; cetere partoprenas tiun provizoran komitaton, Sroj Jaime Grau Casas (Kataluno); Karl Minor (Germanujo); Jan Jacobs (Belgujo).

A. Smit.

De vort' al agado rapide, sentime!

Karaj geamikoj! Ĉu ĉies el nia koro ne kunpremiĝas dolore konstante la maldolĉajn faktojn kaj la okazontaĵojn? Ni, la hirundoj de l' homaro ne povos dume pepi pri la printempo. Ni, kies devo estus ĉiam montri al eksteruloj ekzemplon de nia unuiĝo, solidareco, persista laborado, honesteco, paco, amo, reciprokaj pardonemoj kaj helpo estas nun travivontaj inter ni

mem, en nia propra medio la neeviteblan skandalegon. Devo, pezo malagrabla; antaŭ ni kuŝas leviĝi frato kontraŭ frato. Elmontriĝas malĝoĝiga vero. Tiuj, al kiuj konfidis ni la zorgojn pri nia tuta afero kaj la gvidadon de nia movado, ne nur ne pravigis niajn esperojn sed per sia sintenado komdamninda, per tuta agado sia, minacas eĉ la ekziston de nia bela lingvo mem, kondukas nin al abismo. Ni do ĉiuj devas unuiĝi, kaj ripari la aferon forigante la kulpulojn, sankta ĝi estas, super ni, super ĉia personeco staranta. La afero koncernas ne malpli ol savon de niaj honoro movado kaj la lingvo mem. Tial, en nuna tiom kriza tempo ĉia pasiveco kaj indiferenteco estas veraj krimoj. Senprokraste kaj dece la esperantistaro sin preparu, atente, serioze, prudente, kiel ĥirurgiisto sin preparas por ia grava operacio. Jam longa estis la sekeco. Tro multe da elektro en atmosfero amasiĝis.

La fulmotondro estis atendata, dezirata. Kaj jen ĝiaj simptomoj venas. Sur horizonto de esperantista publiko opiniis ankoraŭ neproksimaj fulmostrietoj zigzagas.

(daŭrigas)

For la rapidkursoj.

Por ree montri la senutilecon, la maltaŭgecon de la sistemo „Esperanto en 15 lecionoj” per kiuj

La Aŭgusta numero aperos (iom prokraste) Mardon 7an de Aŭg. kaj estos havebla en la informejo „Café Artes”.

Sro Schoofs kaj sia anaro persiste kontraŭlaboras la oficialajn urbajn kursojn, ni publikigas poŝtkarton de iu, al kiu „La Verda Stelo” aljuĝis diplomon kun granda merito.

Amata Sinjoro,

Hodiaŭ semonjo mi estis nee kapabla por iros al vi. Proksima semonjo mi esperas weni al vi. Kiu estas via sana? Mi esperas bona. Multoj de saluto.

Komentarioj superfluaĵ!!!

For la rapidkursoj!

Respondo al Sro A. R.

Vi demandas al ni, ĉu efektive ekzistas loka organiza komitato por la XXa universala kongreso de Esperanto, ĉar vi legis ke „Verda Stelo” aranĝis kunsidon dum kiu oni aranĝis la sekciojn de la kongreso.

Ni nur povas respondi al vi ke ni supozas ke L.O.K. ekzistas, ĉar ni eĉ vidis la nomojn de la komitatanojn. Sed kiuj estas ĝiaj povoj, ni ne scias berte estas ke la L.O.K. kiu kalkulas kelkaj sincerajn homojn kiuj tamen jam de longe ne plu okupas sin pri esperanto, rajtas pripensi sed „La Verda Stelo” ordonas. La L.O.K. nur estas nomo malantaŭ kiu kaŝas sin „Verda Stelo”.

A.P.P.K.

Chokoladoj ekstrakvalitaj

VANOVA

Belgiëlei, 37, Antwerpen - Belgujo

„ESPERO” ektrafondanta.

„RADIO” lakto-chokolado.

Subtenu la esperantan entreprenon!

BULTENO

MONATA DE EL DONO LA

ANTVERPEN PROPAGANDA  POR ESPERANTO KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDER 55 TRAAAT 51

4^a JARO

N^o 8

AŬGUSTO 1928

JARA ABONO
UNU NUMERO

BELGUJO : 3.— Bfr.
„ 0.30 Bir.

EKSTERLANDO : 1.25 Svr.
„ 0.15 Svr.

Krima solregemo.

Eble multaj kongresanoj miris pri la malmultaj belgoj, kiuj partoprenas en la nuna kongreso. El la unua mil enskribintoj estas sepdek kvin belgoj, el kiuj kvardek loĝas en Antwerpen kaj ĉirkaŭaĵoj; dek-ok loĝas en Brussel; la aliaj loĝas en la norda parto de la lando, krom unu, kiu estas de Verviers. Multe tiuj-ĉi ciferoj diras. Ili montras ke en Belgujo ankaŭ io ne estas en ordo. El la tuta suda duono de la lando nur unu partoprenanto! El Liège, Spa, Charleroi, Namur, neniuj. El Gent, la urbo de la prezidanto de K. R., du personoj krom li mem, sin anoncis. La kaŭzo de tio estas ke en Belgujo regas granda malkontenteco pri la nunaj ĉefaj estraranoj de Belga Ligo Esperantista, kiu forigas de plej bonajn elementojn el la agema partoprenado en la esperanta agado. La krima solregemo pri kiu ni jam havis la okazon skribi en la „Bulteno“ de aprilo 1925 ankoraŭ plifortiĝis de post tiu tempo je la malutila de la movado. En Belgujo ne plu regas la necesega unueco, la varm amikeco; tial multaj entuziasmaj samideanoj preferas forlasi la movadon.

En Antwerpen tiu-ĉi malagrabra situacio estas la plej grava pro la netolerebla obstineco de la plej perfekta aŭtokrato, kiun subtenas kelkaj devigaj flatemuloj kaj naivaj nespertuloj. Lia devizo estas: „Koncentrigo en unu mano, sed... en la sia.”

— Kiu estas la adreso de „La Verda Stelo“?

Ĉe la honora prezidanto, Kleine Hondstrato, 11 Antwerpen

— Kiu estas la adreso de la ĉefdelegito de U.E.A.?

Kleine Hondstrato, 11, Antwerpen.

— Kiu estas la adr. de Belga Ligo Esperantista?

Ĉe la prezidanto, Kleine Hondstrato, 11, Antw.

— Kiu estas la adreso de Belga Esperanto Instituto?

Ĉe la administranto, Kleine Hondstr., 11, Antw.

— Kiu estas la adreso de „Belga Esperantisto“?

Ĉe la direktoro, Kleine Hondstrato, 11, Antw.

— Kiu estas la adreso de K.R.?

Ĉe la sekretario-kasisto, Kleine Hondstrato, 11, Antwerpen.

— Kiu estas la adreso de la reprezentanto de Belga Ligo en K.R.?

Kleine Hondstrato, 11, Antwerpen.

— Kiu estas la adreso de la XXa universala kongreso de Esperanto?

Ĉe la ĝenerala sekretario, Kleine Hondstrato, 11, Antwerpen.

Tio sufiĉas; pliajn adresojn vi certe ne bezonas.

Kiam en 1924, Sro De Waegenaere, konstatante ke la laborado de la lokaj esperantistoj ne donis la espereblajn rezultatojn, kunvokis reprezentantojn de ĉiuj grupoj por kune agadi, la solregulo altrudis sian malpermeson al „La Verda Stelo”, pretekstante ke, se pli intima kunlaborado estas necesa, ĉiuj devas nur aliĝi al lia grupo. La kaŭzo estis verŝajne ke li timis ion perdi de sia aŭtoritateco, ĉar en oktobro 1915, li mem faris la proponon definitive starigi la Antverpenan gruparon esperantistan kaj pritraktis tion en tri kunsidoj: Sed tiam la iniciativo venis de li mem, nun ne; kaj tio aliĝas la tutan aferon. Malgraŭ tio A.P.P.K. fondiĝis; sed li uzas ĉiujn fortojn kaj influojn por malhelpi ke grupoj aliĝu al la necesega organismo.

En 1921 du oficialaj reprezentantoj el Belgujo partoprenis en la XIII kongreso (Prah), unu reprezentante la Ministerion de Sciencoj kaj Artoj; alia, la Belgan Ligon Esperantistan. La enkorpiĝulo de la movado en Belgujo, laŭ profesio komerca oficisto, reprezentis ministerion kaj lernejestrino el la ĉefurbo povis plenumi la duan taskon, kompreneble multe malpli honorigan, reprezenti B.L.E.. Kia kontraŭdiraĵo!

Sekve de personaj klopodoj de du instruistoj kaj poste de A.P.P.K. la urba administrantaro organizas oficialajn vesperkursojn de Esperanto. Anstataŭ helpi la sukcesigon de tiaj kursoj la „ĉefulo” kontraŭbatalas ilin. La kialon? Ĉar li, ne estante instruisto, ne povas ricevi la oficon de profesoro de tiuj kursoj. Kia malinda ambicio!

En 1924 ni antaŭvidis ke baldaŭ okazos universala kongreso en Antwerpen. Ni instigis la Antverpenan Polican Grupon repreni ĝian funkciadon kaj peti ke la urba administrantaro organizu kurson de la internacia lingvo por la policistoj. Ni deziris helpi por ke urba instruisto estu pagata por tiu instruado. „Ne povas esti” diris la aŭtokrato kaj proponis mem fari la kurson senpage. La urbeŝtaro kompreneble akceptis tian aranĝon. Poste li transdonis la taskon al juna instruisto, kiu sekve devas labori senpage. Sed ne tio estis la ĉefa celo. Agante tiamaniere li subjugis kaj konservis la Polican Grupon sub sia

regado. Cetere la Polica Grupo ne aliĝis al A.P.P.K. kvankam multaj anoj tion certe deziras.

La 15an de novembro 1924 la direktoro de U.E.A. informas nin ke ili estas principe konsentaj pri la elektado de plia delegito, ĉar ĝis tiam la ĉefdelegito kaj la delegito, estis la sama solregulo. Li nur sciigis kion li bonvolis; neniue la anoj eĉ havis regularon. Kaj kio okazis? Unue dirinte en la kunveno ke tio ne estas necesa, iom da tempo poste li mem proponis al la direktoro de U.E.A. kelkajn amikojn kiel delegitojn por la antaŭurboj de Antwerpen. La propono estis aprobita kaj la afero solvita laŭ la plaĉo de la ĉionaranĝanto.

Dum la kongreso de Wien en 1924, Sro Privat demandis al du anoj de A.P.P.K. ĉu estus eble aranĝi universalan kongreson en Belgujo en 1925. Firman respondon ili ne povis doni. Reveninte hejmen ili raportis pri la demando dum kunveno de A.P.P.K. Plene da laboremo oni volonte akceptus la aranĝon. Sed ne dezirante sole laboradi A.P.P.K. kunvokis la restantajn anojn de „la Sepo por la Sepa”. Ĉiuj estis plene da entuziasmo, krom la diktatoro. Li kondamnis la faritan paŝon de A.P.P.K., nomis ĝin eregula kaj trovis aliajn erarigajn argumentojn por tiam neokazigi la kongreson. Dume li ĉirkaŭis sin de kelkaj servemaj amikoj, forigis la verajn iniciatintojn de la nuna kongreso kaj sukcesis denove sole ĉion aranĝi laŭ sia plaĉo. Neniu ano de grupo aliĝinta al A.P.P.K., kiu tamen prizorgis alinunanan kongreson en Antwerpen, ricevis enskribilon!

Multaj demandas kiel estas eble ke tia agado daŭru, kial ni lasas fari la aŭtokraton. Tio devenas de la granda pacemo de A.P.P.K., de la nescio de la plimulto de la belgaj samideanoj kaj de la ruza diplomatio de la solregulo, kiu havas je sia dispono politikan influon, materialan devigon kaj naivan fidon. Aldonu al tio la subtenon de samkarakteraj personoj el la Centra Movado kaj vi komprenos facile.

Tamen sufiĉas! Se vi, precipe la Belgoj, deziras la prosperadon de la movado en nia lando, ne plu silentu kaj agu. Nepardonebla estas via kulpo se vi ne tuj finigas la kriman solregemon de la malbeninda aŭtokrato kaj lia flatemularo.

A.P.P.K.

De vort' al agado, rapide, sentime!

(daŭrigo)

Ekblovetas tra vicoj de nia anaro. Tiu bloveto, antaŭulo de ventego kresku, disvastiĝu, de lok' al loko flugante, de societ' al societo, de grup' al grupo, de person' al persono, presorgane, skribe, buŝe. Ĉiu sciĝu pri la noblaj kaj kuraĝaj iniciatoj de Londona kaj Pariza Samideanoj. Al ĉiu estu konata la enhavo de iliaj folietoj, malfermantaj al ni la okulojn. Transformiĝu do la bloveto en ventegon de la justa indigno de la tuta esperantistaro. Tiu ĉi ventego renversu la nunan traputrintan konstuaĵon de U.E.A., elŝiru la arbojn senfruktajn kaj deŝiru la foliojn velkintajn.

Sentime, antaŭen al la sankta ribelo! „Ribelo“?... Ĉu estas „ribelo,” se ni, simile al kiu ajn societo aŭ grupo volas nur en nia propra, granda asocio la ordon restarigi, dezirante ke la mono de ni pagata ne estu sen komuna kontrolo elspezata kaj ke niaj oficuloj fidele kaj honeste laboru? Ĉu ni ne rajtas tion fari? Sentime! Eĉ kvazaŭ moke sonas la vorto, en tiu ĉi okazo. Ĉu oni devas ion timi riparante en sia propradomo? Ne estas do ribelo, nek revolucio, nek reakcio.

Lasu ni la ruzan kaj malican ĝenevanon sin imagi la prezidanto, diktatora reĝeto de la „Ŝtato Esperantujo”. Li, kun siaj „ministroj” iru pluen, eble revante eĉ pri kreo de propraj „esperantaj” polico, malliberejoj, soldatoj, ŝiparo!...

Malproksimaj de ĉiaj sovaĝaj fantazioj, ni kompreneble toleras nenian aŭtokratecon, diktatorecon, oligarĥion en nia mezo.

Ni ne ludas je ŝtato. Por ni Esperanto ne estas amuzaĵo, sed ankaŭ ĉio la praktika ilo kaj la grava socia faktoro. Tial kara por ni estas la konservado de la Zamenhofa lingva pureco, ne malebliganta la prudentan evolucian surbazon de l' fundamento.

Vormigas nin la ĝeneva ĵargono ekreginta sur paĝoj de la oficiala organo jam baldaŭ de post la milito. Ni ja scias nun, kiu paralizis la laboradon de niaj lingvaj institucioj tiel urĝan nuntempe.

Ni scias nun la kialon de ĉiuj malbonoj. „Ĉe

ni oni ne kutimis al la simila predikado...” Jes, sinjoro, belfrazisto sed kiu estas „ni”? Ĉu serioze vi vin imagas: Ni, Nikolao la IIa? Al la agado, gesamideanoj! Ne forgesu nur ke la ĝeneva „registaro” estas ege ruzaj kaj lertaj diplomatoj. Jam nun ili sin preparas por kontraŭatakoj: Ili sendube eluzos ĉiujn rimedojn kaj interalie siajn rilatojn kun eksteraj influoj por eliri „sekaj el akvo” kaj teni siajn postenojn, ĉar Esperanto estas por ili bona objekto de persona profito. Do ree mi diros, ne estu indiferentaj; ne silentu, ĉar via silentado estos kalkulata kiel konsento kun la detruantoj de nia movado. Al batalo justa kaj sankta; vero ja estas je nia flanko. Nia armeo — la plej parto de la esperantistaro; niaj armiloj — la libera opinio de la esperanta popolo, presorgane, skribe, buŝe esprimata — la forto, kiu jam sin pruvis nur antaŭ kelkaj monatoj, koncerne la lingvaĵon de unu presorgano. Kaj senbridiĝo de ĝia redaktoro. Ĉu tiel ĉu alie la esperantistaro proklamos sian juĝon, forigos la kulpulojn. Komdamno, bojkoto, malbeno, forgeso laŭru la kapojn de la novaj Beaufront'oj kaj Judasoj!

U.E.A. tia kia ĝi nun estas ne plu povas ekzisti. Por la bono de nia afero la nuna gvidanto de la oficiala movado kune kun sia kompanio devas forlasi ne nur siajn postenojn sed ankaŭ la oficialan movadon ĝenerale. Se malgraŭ ĉio ili ĉio ili tion ne farus — tiam en la kason de U.E.A. eĉ unu centimo ne plu eniros. Do restos ĝi tiam vere propra Privat'a organizaĵo.

Ni devas remonti de fundamento ĝis tegmento sur la vere demokrataj principoj kun libera kaj malkaŝa voĉdonado de la membraro kaj severa kontrolo publika (ne tiu de amikoj, bofratoj kaj partianoj) super la elspezoj de la asocia mano. Tiam niaj „ĉefoj” mi opinias ne plu lukse bankedados, nek vojaĝos tiel ofte kaj kun tia komforto.

Ni nin pretigu, amikoj. Dum la XXa la „Revolucio” komenciĝos. La noblaj viroj senhezite oficiale en la salonegoj vizaĝe al ĝenevaj sinjoroj kaj la stabo de iliaj Antverpenaj kaj alilandaj amikoj ni malkovras la veron antaŭ la tuta kongresanaro. Ankaŭ venas la urbon multaj kiuj ne partoprenas le kongreson. Kio ajn estus, ni ĉiuj kiel unu devos grupiĝi ĉirkaŭ tiuj, kiuj al ni malfermis la okulojn kaj ekbatali ŝultro ĉe ŝultro.

Estu do la 20a kontraŭe al la 19a nomita de

iu „danciga”, la kongreso almenaŭ vekiga vidiga. ke ĉiu eksciis en kian danĝeron metis nin la Sinjoro, marĉandante kun niaj malamikoj, trompante la esperantistaron, senkontrolite regante kaj mastrumante kaj meritante ne bruaĵn ovaciojn, sed surdigan fajfadonkaj laŭtan ĉiuspecan obstrukcion.

Simpla esperantisto.

Interparolado inter du malnovaj esperantistoj

- Ha ! Bonan tagon, Henriko !
- Bonan tagon, Ludoviko ! Jam de longe mi ne plu vidis vin. Kiel vi fartas ?
- Mi ? Ĉiam bone ! Kaj vi ?
- Ankaŭ bone, kiel vi vidas.
- Kiu novaĵo ?
- Hm ! Malmulte. Ĉu vi ne partoprenas en la XXa kongreso de Esperanto ? Vi ja scias ke ĝi okazas en nia urbo ?
- Jes, mi scias ! Sed, aŭskultu, Henriko. El tia radaro, en kiu ĉiam nur unu sola persono nepre devas esti superpotenco kaj agi laŭ sia plaĉo mi preferas forteli la manojn. Mi ankoraŭ ĉiam multe sentas por Esperanto, sed je tia persono kiel Sro S mi ne submetas min. Kiom la tempoj de antaŭ la milito ŝanĝiĝis ! Antaŭ kelkaj tagoj mi ankoraŭ parolis kun Dro V. D. pri tio kaj li samopinias. Li ankaŭ ne plu montras sin pro la sama kaŭzo. Mi ege bedaŭras tion, sed kion vi volas ?

- Estas vere ; sed bedaŭrinde estas ke tia bela movado suferas pro tia sinjoro.
- En la esperanto movado ne povas esti ĉefulo. Zamenhof havis tiun rajton, sed neniu plu post li.
- Tio estos precize la temo pri kiu parolis Sro Sm. el Holando kiam li vizitis A. P. P. K „Neniam ĉefulo en Esperantujo” estis lia temo. Ĉu vi jam aŭdis pri la pamfleto „Al la Esperantistaro” de Sro Delanoue, la ĉefdelegito de U.E.A. por Francujo, en kiu li akre atakas Privat ? Mi antaŭvidas ke baldaŭ bombo eksplodos en Esperantujo kaj neniigos la aŭtokratojn.
- Ni esperu ke tio estu kiel eble plej baldaŭ.
- Adiaŭ, Ludoviko !
- Ĝis revido, Henriko !

Jus aperis

AMO kaj POEZIO

Poemaro de Jan Van Schoor, kunlaboranto de multaj esperantaj revuoj.

La libro, granda je 96 paĝoj, kostas nur 10 fr. Oni mendu ĝin ĉe la aŭtoro Julius De Geyterstraat, 149/1, kaj pagu per monbiletoj aŭ per la poŝtĉekkonto 173509

Chokoladoj ekstrakvalitaj

VANOVA

Belgiëlei, 37, Antwerpen - Belgujo

„ESPERO” ektrafondanta.

„RADIO” lakto-chokolado.

BULTENO

MONATA DE EL DONO LA

ANTVERPENAJ PROPAGANDA E ESPERANTO KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SNIEDERSS TRAAT 51
SEPTEMBRO 1928

4^a JARO

N^o 9

JARA ABONO
UNU NUMERO

BELGUJO : 3.— Bfr.
„ 0.30 Bfr.

EKSTERLANDO : 1.25 Svfr.
„ 0.15 Svfr

La nekonata Soldato

*Niniu en la mondo konas vin
E. PRIVAT*

Sabaton, la 11an de aŭgusto, multaj partoprenantoj en la XXa Universala Kongreso de Esperanto veturis al Bruselo. Inter alie ili iris al la tombo de la belga nekonata soldato kaj metis sur ĝin florgarbon.

En la pli multo de la landoj (se ne en ĉiuj), kiuj partoprenis en la terura mondmilito oni kondukis kun la simpatia partopreno de la nacio, kun ceremonio pli solena kaj impresiga ol tiu per kiu oni iam honorigis la plej faman aŭ potencan monarkon, nekonatan soldaton al lia lasta ripozejo en la plej bela loko de la ĉefurbo kaj starigis por li imponan monumenton. Eterna lumo lumigas la sanktan lokon.

Kial estas eble tiom honoro, eĉ adori iun nekonatan homon? Ĉar lia morto personigas en la plej alta grado, plej perfekte la neprofiteman sinoferon. Ne celante ian famon, eĉ ne pensante pri ebla danko aŭ rekompenco, en la plej granda soleco, post la plej teruraj suferoj, li fordonis sian junan vivon, kiun al li ankoraŭ promesis tiom da plej feliĉaj momentoj. Neniu flegis liajn ter-

urajn vundojn, neniu kalmigis lian brulantan febron, neniu malsekigis liajn soifantajn lipojn. Sola, tutsola li elportis sian suferadon. Al neniu li povis esprimi siajn lastajn kordezirojn; neniu aŭskultis liajn lastajn vortojn; neniu kompata rigardo trafis liajn rompiĝantajn okulojn. Kaj kiam li fermis la blujn okulojn, kiam lia nobla animo forflugis el la mortvundita korpo, post kiam trapasis lian lacegan cerbon ĉiuj al li tiom karaj bildoj el la feliĉa estinteco, tiam li trankvile eniris la eternan dormon de la justuloj neplendante, kontente ridetante pro la certa konvinko ke li faris sian tutan devon, sopirante ke liaj penadoj jam nun devas ĉesi. Pli, ankoraŭ pli, multe pli li volus fari, li volus suferi por la feliĉo de la homoj, por la paco en la mondo.

En la Esperanto-movado ankaŭ estas multaj „nekonataj soldatoj”, kiuj en silento, nebruante pacience fordonas siajn plej bonajn fortojn por nia sankta afero. Ili ankaŭ ne celas, eĉ ne pensas pri ebla famo. En la oficialaj rondoj oni ne konas ilin, oni ne parolas pri ili; neniam iliaj nomoj estas menciataj. Ili ankaŭ ne deziras tion, sed simple daŭrigas persiste la alprenitan taskon, ĉar en ilia senambicia nemakulita koro arde brulas

la vera, nedifektita sankta fajro, kiun nenio povas malpliigi aŭ estingi. Ilia agado estas despli nobla; despli plene ili reprezentas la veran bildon de la sinforĝesema apostolo por la alta celo de la Esperanto-movado.

La „nekonata soldato“ estas por ni la personigo de la plej pura, la plej perfekta, la ideala esperantisto. Nomon li ne postlasas; sed restas la rezultato de lia humila agado, kiu starigas por li nedetruoblan, neniam malapereblan monumenton.

O, miles ignote, tuae res gestae ceterorum laudibus obscuritatem afferunt! (H.)

J. Jacobs.

Nefidindaj sciigoj.

Ni ekscias el plej fidinda fonto, ke la L. K. K. de la XXa havos tre grandan deficiton. ĉar ĝi elspezis tro multe da mono por la floroj oferitaj al la aktorinoj dum la prezentadoj de la tragedio „Hamleto“.

Post la fino de la prezentado de „Hamleto“, la tuta L.K.K. kaj la ĉefuloj de la kongreso venis malantaŭ la scenejon por danki kaj gratuli la geaktorinojn pro la giganta laboro kiun ili liveris.

Oni asertas ke la delegito de A.P.P.K. ĉe la kongreso, kiu nur pagis 175 frankojn kiel la aliaj kongresanoj, sidis dum la prezentado en la honora loĝio.

LOGIKO.

Kiam oni demandis al la prezidanto de L.K.K. kie restis la pioniroj de la Antverpena movado, S-roj D-ro Van Melckebeke, Finet, Swaegers Dro Broeckaert, k. a. la prezidanto respondis ke tiuj Sinjoroj ne **estas plu** esperantistoj. Sed kio estas la Sinjoroj Oscar Van Schoor, Ritschie kaj S-ino Elworthy-Posenaer?

Urbaj Vesperkursoj

La 1an de oktobro niaj oficialaj urbaj vesperkursoj rekomencos.

Se ĉiu el vi nur sukcesas varbi 2 aŭ 3 novajn kursanojn, ni duobligos certe la nombron de la nun ekzistantaj klasoj.

Propagandu ĉiuj en viaj mezoj kaj ni notos konsiderindan venkon!

La novaj lernantoj enskribigu sin komence de la 24a. de Septembro en la jenaj lernejoj:

Louizastrato.

Van Maerlantstrato.

Pierenbergstrato. - Kiel.

Pliajn informojn, petu de

A. P. P. K.

Nia Ideo.

Okaze de la 20a Universala Kongreso de Esperanto, la Soc. grupo „Nia Ideo“ organizis Internacian kunvenon por laboristoj esperantistoj. Ĝin ĉeestis 60 gekamaradoj el ok diversaj landoj. Je la malfermo la k-do prezidanto salutis la gekamaradojn alilandajn je la nomo de la belga laborista esperantistaro. Per kelkaj vortoj li al la ĉeestantaro rakontis la historion de la belga laborista-esperanto movado.

Poste hispana kamarado parolis pri la laboristoj-esperantistoj en sia lando. Tion ankaŭ faris du anglaj k-doj pri Anglujo, dum hungara k-do, maristo, pri Esperanto ĉe la maristoj rakontis. Pola k-do raportis pri Bulgarujo, kie Esperanto estas malpermesata. La kaŭzoj de tio tre infanecaj estas. Ĉiuj parolintoj salutis la belgajn gekamaradojn je la nomo de la laboristoj-esperantistoj en sia lando.

La ĉeestantaro de la kunveno poste amike povis interbabili, kaj kun vera bedaŭro ili unu la alian forlasis.

Dum ĉi tiu sukcesplena kunveno, oni decidis sendi salutleteron al la 8a kongreso de S. A. T. en Göteborg.

Alfonso

* * *

La 25an de Aŭgusto okazis la ĝenerala jarkunveno de „Nia Ideo“. La prezidanto nun estas k-do Isidoor van Praag.

Internacia - Esperanto - Muzeo

Estiĝo kaj nuna stato.

De Leono Zamenhof venis en la antaŭa jaro la ideo, krei okaze de la 50 jara jubileo de Esperanto „Internacian Esperanto-Muzeon“ - ie.

Ŝajnis al mi eble, interesiĝi por tiu nediskuteble unika kaj valora afero sufiĉe grandan aron de eminentaj oficialuloj en Aŭstrio. La faktoj pruvis min prava!

Mi kunigis areton da helpemuloj; fondis la leĝe postulitan societon kiel agbazon kaj iom post iom atingis, ke eniris nian „Internacian Honoran Komitaton” jenaj personoj:

Kanceliero d-ro Ignatz Seipel

Ministro p. instruaferoj Schmitz

Ministro p. Komerco d-ro Schürff

Landestro d-ro Buresch

Vicurbestro de Wien Franz Hoss

Kardinala moŝto d-ro F. G. Piffl, ĉefepiskopo en Wien

Policprezidanto ekskanceliero Schober

Sekcia ĉelo en Bundeskanzleramt d-ro Uebelhör.

Membro de Akademio p. Sciencoj-Wien, kort.-kons. d-ro Molisch, prof. de Universitato-Wien

Kort.-kons. d-ro fil. kaj inĝ. Schumann, prof. en Teknika Altlernejo-Wien

Ĝen. direktoro d-ro Maschat de Aŭstriaĵ ŝtatfervojoj.

Post kelkaj semajnoj la registaro promesis al mi ejojn. Sed malgraŭ la bona volo de l' kanceliero kaj la senĉesaj klopodoj de lia sekcia ĉefo d-ro Uebelhör la manko je neokupitaj ejoj en ŝtataj konstruaĵoj en aprilo provizore ne permesis fari pli ol disponigi al ni unu ejon por preparaj laboroj en Liebiggasse 5, apartenanta al Universitato. Ĉar tiu ne plene kontentigis nin, ni ricevis komence de junio en ŝtata konstruaĵo (Plej Supera Kalkulkontrolistaro) I. Annagasse 5, meze en la urbo helan, agrablan ejon. Tie ni nun oficas, akceptas materialon poŝte senditan kaj persone transdonitan. Ĝis nun ni povis registri 64 donaculojn.

Ankaŭ subvencioj alvenis de „N. Oe. Landesregierung”, „Oesterr. Bundesbahnen” k. a. de oficialaj kaj privataj lokoj.

Kvankam havante tiun jam sufiĉe firman bazon, kvankam ankaŭ la personoj eklaborintaj ne meritis iun dubon en la internacia publiko, ni tamen povis konstati (sed ankaŭ kompreni) hezitemon, kiu sin montris en la esperantistaro mem.

Eble mirigos, ke la konata entuziasmo de la esp.-istaro ŝajne haltas antaŭ tia grandioza kreaĵo. Sed ĝi estas tute komprenebla, se oni pripensas, kiom valora estas la materialo precipe la maloftaĵoj por la estonto kaj la respondecon, sendi ĝin en malproksiman landon

sen sufiĉa garantio. Tiun senton de respondeco ni plene respektas kaj pro la sama sento ni daŭrigis nian penadon por atingi la plej eblan garantion.

De la unua momento ni konsciis, ke la plej bona, sed ankaŭ plej malfacila solvo estas aranĝi la muzeon sub ŝtata administrado.

Post streĉaj intertraktoj kun la ĝen. dir. de „Nationalbibliothek” mi sukcesis atingi, ke interkonsente kun la ministro por instruaferoj la muzeo estos aligata al tiu mondfama instituto kiel aparta kolekto.

„Nationalbibliothek”, iama „kortega biblioteko”, fondita en la 15a jc., estas unu inter la plej ŝatataj, altkvalitaj kaj grandaj en la mondo. (daŭrigas)

Niaj kongresarangoj.

Vizito al la diamantmetiejoj.

Mardon, la 7an de aŭgusto proksimume 200 kongresanoj kunvenis por rigardi kelkajn interesajn detalojn de la diamantindustrio.

Unue oni iris al la Diamantborso, kie la vigla agemeco, malgraŭ la libertempa atmosfero, povis doni ideon pri la komercoperacioj de la fako. Post vizito al la diamantborso kaj aliaj organizaĵoj de tiu-ĉi klubo, oni iris al la oficejoj de Sro Jonas Lek, Simonsstrato. Tie oni montris al la partoprenantoj la disfendadon kaj kvantojn da krudaj diamantoj, sufiĉe grandaj por kontentigi ĉiujn kongresanojn.

Poste oni vizitis la firmon Van Dam, Lamorinièrstrato. Tie oni laŭvice la segadon, la senkrudigadon kaj la facetadon, kaj tie-ĉi, la vizitantoj, kiuj vidis ĉe Sro Lek krudajn diamantojn, povis admiri la finfinitan produktaĵon, de la tre malgranda ĝis la granda.

La promenado finiĝis per vizito al la Sidejo de la Faka Unuiĝo kaj al la biblioteko. Dankinte pro tio kion oni ĝuis, oni reiris al la kunsidoj de la kongreso.

Ni devas esprimi nian dankon al Sro Lek, pro la bonvolemo per kiu li montris tiom da intersaj aferoj al niaj gastoj, al la estraro de la Diamantborso kaj al Sro Salomons, direktoro de la fabrikejo Van Dam. Dankvorton ankaŭ al niaj samideanoj J. kaj A. Swalf, Cats kaj aliaj, kiuj gvidis la vizitantojn kaj al Alex Booleman, kiuj

montris al ili tiom da interesaĵoj.

* * *

La sekvintan tagon venis duan demandon, kiun ni ankaŭ povis plenumi, dank' al la bonvolemo de Sroj J. Zeldenrust, kiu montris al ni la segadon kaj la disfendadon (ni ankoraŭ povis admiri pecon de grandega ŝtono sur la segmaŝino) kaj Jac. kaj Em. Van Dam, fabrikejo Van Geertstraat, kiuj montris la senkrudigadon kaj la facetadon. Precipe la fantaziaj modeloj altiris la atenton.

Laŭ „De Diamantbewerker”.

Verkoj de Zamenhof.

(daŭrigo)

„Publika Danko” al Michaux kaj aliaj. En „Lingvo Internacia.” 1905. p.421.

„Projekto de Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo.” (la antaŭparolo al la „Deklaracio pri Esp-ismo”) En „Boulet, Kongresa Libro. 1905. p.81-82,

„Leopold „Einstein.” Nekrologa artikolo. En „Germana Esperantisto. 1906. p.13-14, 25-26.

„Letero pri Festotago de la Esperantistoj” En „Germana Esperantisto” 1906. p. 68.

„D-ro Emilo Javal.” Nekrologa artikolo. En „La Revuo” I, 1907. p 289-291.

„Pri Reformoj en Esperanto.” Artikolo. En „La Revuo” I, 1907. p. 385-387.

(daŭrigas)

GRUPA VIVO

ATENTU.

La Rekta-Vojanoj ne plu kunvenas en „Hotel Cecil”.

La nova sidejo estas
 „Antwerpsch Koffiehuis”,
 6, Van Straelenstraat
 Antwerpen

BALO

Nia malferma BALO okazos la 19an de novembro en la salono de la „Grand Café des Billards” Van Arteveldestraat, E/U.

NIA IDEO

Sekve de la peto de diversaj kamaradoj, kiuj ne povas ĉeesti la oficialajn vesperkursojn de Esperanto, kaj interkonsente kun A.P.P.K., NIA IDEO komencis kurson de la internacia helplingvo en la sidejo „Achtrenhuis”, Carnotstraat, 112,

de post la 12a de Septembro. La kurso okazos regule ĉiun merkredon je la 7 1/2. La kursgvickanto estas k-do Theo Mortiers.

* * *

PROGRAMO POR SEPT. KAJ OKT.

15an de Sept. Parolado Theo.

29an „ Muzik-Vespero.

6an de Okt. Parolado k-do Mertens.

20an „ Aerts parolados

„Ĉu S.A.T. estas necesaj

3an de Nov. Van Brouwere:

„Mia Vojaĝo al Parizo”

Kie renkontiĝas la Antverpenaj Esperantistoj ?

Ā. P. P. K. La 1an kaj 3an jaŭdon de la monato, je la 8a, en kafejo „Artes” Statieplein.

Suda Lumo. La 2an kaj 4an sabaton de la monato je la 8a, en Bexstraat, 11, (J. M. C. A.)

La Rekta Vojo. Ĉiusabate je la 8a, en „ANTWERPSCH KOFFIEHUIS”, Van Straelenstr. 6.

Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj. Ĉiumarde, je la 8a, en Plantijnlei, 66-68.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj. Vidu „SUDA LUMO”.

Hoboken'a Grupo Esperantista. Café „OUIDE SPIEGEL”, Kioskplaats, 48, Hoboken. La 2an kaj la 4an sabaton de ĉiu monato, je la 7a vespere.

SUBTENO DE LA BULTENO.

Donaco de S-ro J. Halstead el Royston (Anglujo) pere de S-ro Janssens por la belaj fotografaĵoj. 20,50 fr.

GRATULOJ

Je la 1an de septembro S-ro H. Michiels kaj A. Roose, anoj de „Suda Lumo”, estis nomitaj ŝtataj kantonaj inspektoroj de la elementa instruado, respektive en la kantonoj Hal kaj Oostmalle. Al ambaŭ samideanoj ni prezentas niajn plej korajn gratulojn.

Ĉu vi jam scias ke ano de A. P. P. K. liveras bonegajn belgajn karbojn ?

Demandu prezojn al

J. BOVOY

Minderbroedersrui, 64, Antwerpen

Presejo SELE & VAN DER MAST, Prinsesstr. 11 Antw.

BULTENO

MONATA EL DONO
DE LA

ANTVERPENIA PROPAGANDA
E
POR ESPERANTO
KOMITATO

REDAKTEJO:
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO
AUG. SMIEDERSSTRAAT 51

4^a JARO

N^o 10-11-12 OKT.-NOV.-DEC. 1928

JARA ABONO
UNU NUMERO

BELGUJO : 3. — Bfr.
„ 0.30 Bfr.

EKSTERLANDO : 1.25 Svir.
„ 0.15 Svir.

Al niaj legantoj.

La nuna bulteno estas la lasta de la jaro 1928a. Por la translokigo de nia presejo kaj aliaj kaŭzoj tute sendependaj de nia volo ĝi aperas kun tre granda malfruiĝo, pro kio ni petas ke niaj legantoj bonvolu senkulpiĝi nin.

Baldaŭ ni ankaŭ aperigos la unuajn numerojn de la nuna jaro kaj ni faros nian eblon por ke la Bulteno aperu pli regule kaj akurate ol dum la pasinta jaro.

Samtempe ni profitas de la okazo por peti la grupojn kaj la abonantoj senprokraste sendi la abonprezon por la jaro 1929.

A. P. P. K.

Ĉu A. P. P. K. devas bedaŭri ion?

Ĉiuj el ni atente legis en la „Bulteno„ de Julio la artikolon „Neniu Ĉefulo en Esperantujo„ de Adelberto Smit.

Multaj fremdlandanoj legis tiun saman artikolon, precipe ĉar en „Belga Esperantisto„ de Junio aperis „averto„ kiu nepre

devis fiksi la atenton de la esperantistoj sur la agado de A. P. P. K. Estas malgranda eraro en tiu averto : ne A. P. P. K. intencis aranĝi apartan kunvenon por solvi en ĝi la aktualajn esperanto-problemojn laŭ sia vidpunkto.

A. P. P. K. simple metis je la dispono de kelkaj samideanoj sian sidejon kaj sian Bultenon, por ebligi al tiuj personoj atingi dum la Universala Kongreso la esperantistaron, al kiu ili deziris konigi la aferon, jam menciitan en la cirkulero Delanoue.

Ĉu A. P. P. K. devas bedaŭri sian gastemon?

Ne!

La plendoj de S^{ro} Delanoue estis gravaj. Se pravaj, ili devis esti konataj de ĉiuj anoj de U. E. A. — ankaŭ de la eventuale estontaj membroj.

Se malveraĵoj estis per tiu cirkulero disvastigitaj, la tuta Esperantistaro tiam ankaŭ povis koni ilin, ĉar la publikigo, limigita, de la riproĉoj de S^{ro} Delanoue certe ellogus pravigitan proteston. — Tio okazis per la publika deklaro de la Enketa komisiono.

Por kompreni la duan estas necese scii ion pri la unua.

Ke oni ne diru : Tiu afero ne tuŝas A. P. P. K.. Eraro! Sufiĉe multnombraj A.P.P.K. anoj estas membroj de U. E. A.. Sep anoj de A. P. P. K. aliĝis al la XXa. Se ĉiuj neŭtralaj fakoj de A. P. P. K. ne jam aliĝis al la Belga Ligo, tio estas nur pro financa kaŭzo.

Ion tamen A. P. P. K. devas bedaŭri. Tio estas ke S^o Adelberto Smit, kiu jam la unuan tagon de la Kongreso konvinkiĝis pri sia eraro kaj tiam tuj sendis senkulpigan leteron al S^o Privat, kiu juĝis lojale denove senkulpigi sin per „Sincera revoko.. en Heroldo.. de la 31a de Aŭgŭsto, ne juĝis necese presigi ian saman artikolon en la Bulteno, kies numero de Aŭgŭsto ankoraŭ aperis dum la Kongreso mem. S^o Adelberto Smit povas esti certa ke ankaŭ tiam la „Bulteno.. restis je lia dispono !

Ĉar S^o Adelberto Smit preterlasis fari tiun diskretplenan geston, ni opinias havi la rajton kaj la devon kopii lian artikolon el „Heroldo...

Sincera revoko.

Jam per propravola letero al D^o Privat, je la unua tago de la Antverpena Kongreso, mi revokis la unuan parton el mia artikolo en Antv. Bulteno nº 7, ĉar ĝi ne nur estis ofenda al D^o Privat, sed ankaŭ ĉar ĝi malheligis la sferon tiel, ke la trabrilo de klariga lumo en tion, kio estis malhela al ni, estis malhelpata de ĝi.

Kaj ĉar mi volas forpreni entute ĉian pluan makulon, ĵetitan per tiu artikolo sur la personon de la atakato, mi ĉi tie denove kaj nedevigite alie ol per mia propra konscienco revokas, same sincere kiel en mia letero al D^o Privat, ĉion kio estis aŭ povis esti ofenda al li.

La freŝa vento, kiu blovis je la ĵus pasinta Kongreso, forpelis ne nur la nubojn, kiuj mallumigis la verdan regionon nian, sed alportis novan kaj plifortigitan fidon en la gvidado de tiuj, kiuj kondukis Nian Karan Aferon kaj konduku ĝin ankoraŭ multjare, helpate de grandnombra gvidataro, kies helpema ero estas kaj restos ankoraŭ.

ADELBERT SMIT.

Eĥoj pri la kongresaranĝojn de
A. P. P. K. dum la XXa.

Vizito al la privata muzeo „La Ora Sprono..”

Sabaton, la 4an de aŭgŭsto A. P. P. K. organizis speciale por la eksterlandanaj kongresanoj viziton al la fama privata muzeo de antikvaĵoj „La Ora Sprono..” Partoprenis dudek samideanoj. La filino de S^o T. Claes, la posedanto de tiu trezoro afable akceptis kaj gvidis la samideanojn tra la diversaj salonoj. Ĉiuj treege interesiĝis pri la elmontritaj antikvaj riĉaĵoj. F^{ino} A. Van Gansen tradukis en esperanto la klarigojn.

.*

Vizito al la lerneja vilao „Diesterweg.. en Heide-Calmphout.

Merkredon, la 8an de aŭgŭsto, kolego Jacobs, kiu preterlasas nenium okazon por konigi nian institucion al fremduloj, faris unuan viziton kun delegitaro de Esperantistoj, partoprenantoj en la kongreso, apartenantaj al instruistaro.

Ni diru tuj ke, kvankam ni konis nek la nacian nek la internacian lingvon de la vizitantoj venintaj el Hispanujo, Skotujo, Anglujo, Germanujo, Aŭstrujo, Hungarujo, Ĉeĥoslovakujo, ni malofte rondgvidis tian entuziasman viziton. Kolego Jacobs, kelkfoje ankaŭ kolego Vereeck, estis la servemaj interpretantoj por traduki niajn klarigojn en Esperanto.

La tuta antaŭtagmezo estis dediĉita al la vizito : precipe nia agado kiel instruista asocio, la unuiĝa spirito kaj la senprofita sindonema laborado de la geinstruistoj, la principoj kaj rezultatoj de nia liberaera lernejo, la spirito de la kolonia vivado, la morala forto kiu bonfare radias de ĝi sur niaj protektatoj, kaj pliaj detaloj, kiuj karakterizas niajn klopodojn en la pedagogia kampo, estis por tiuj elektitaj, kompetentaj vizitantoj la objekto de alta interesiĝo, de varma admiro. Sufiĉe longe oni restis ĉe la infanoj, ĝuante la sanktan atmosferon, kiu finiĝis per kelkaj kolonistaj kantoj, per la

farado de fotografaĵoj, kiuj konigos nian celadon en malproksimaj landoj, per la mallonga, sed tre sukcesinta alparolado de kolego Jacobs, kiu prezentis al la infanoj la vizitantojn kun la tiel karakterizaj vestaĵoj de kelkaj el ili kaj ekkriigis ilin pro mirego eksciante ke tiuj personoj el ĉiuj anguloj de Eŭropo venis por viziti ilin.

Ni certe ne volas kaŝi tion — supriziga opinio, ne malmulte karesante nian vanecon — ĉu tio ne estas homa — estis rezervita por ni, kaj... ni certe povas konigi ĝin tie-ĉi.

Ĉe la interkonatiĝo ni eksciis ke lerneja direktoro el Charlottenburg estis inter la vizitantoj. Dum niaj tre detalaj klarigoj, ni profitis de la okazo por postuli nian honoron: Diesterweg's Hulpkas (Diesterweg'a Helpkaso) kreis per la starigo de la Konstanta Lerneja Kolonio en Heide la unuan liberaeran en la mondo (Junio 1904).

Tro modestaj, kiel ni ĉiam estis, limigante nin al senpera laborado, oni ne diskonigis tion. Dume ankaŭ en Berlin oni starigis kelkajn barakojn, kien, komence de la jaro 1904, la infanoj el Berlin estis kondukitaj matene kaj ree hejmen vespere. Ni rimarku la diferenco en taŭgeco de tiu eksterulejo kun nia internulejo.

Kaj tamen oni trovas nun Charlottenburg preskaŭ en ĉiu literaturo pri liberaeraj lernejoj ornamitan per la honoro de "la unua... Pro sinceremo ni devas konfesi, ke tempo kaj...manko de trograndigita graveco, ni ne kontraŭagis multe, kaj aliflanke jam diversaj kompetentuloj venis en la lastaj jaraj por postuli nian honestan rajton.

Sed aŭskultu nun! Antaŭ ol la esperantistoj forirus kaj diversaj el ili deziris konservi per fotografaĵoj sian grupon kun nia kolonio kiel daŭran memoraĵon, post kiam ili subskribis la oran libron kaj kompencis kolekton da vidaĵkartoj per malavara donaco, ni vidis sur ĉies vizaĝoj la deziron esprimi siajn sentojn kaj admirojn per paroloj kaj neniu alia ol la direktoro el Charlottenburg estis la interpretanto. Li faris tion kun videbla konvinko, kun plena sincero, plena jeentuziasmo kaj elokventeco, sekvata de la radiantaj rigardoj kaj jesiga aprobo de la kunvizitantoj.

Ni malkaŝe konfesu tion: la parolado, rimarkinda, propramove esprimita opinio de fakuloj venintaj el tiom de malproksimaj landoj, neinfluita de persona simpatio nek de ŝovinismo, estis por ni bonfaranta balzamo. Ho, nun ni komprenis ĝin kvazaŭ per si mem, la Esperantan lingvon, sed ni volonte aŭdis ĝin refoje tradukitan de kolego Jacobs! Ni nur resumas kelkajn el la multaj afablaj frazoj.

"Dum preskaŭ unu semajno ni vidis multe da grandioza kaj bela en la granda urbo Antwerpen. Kiel instruistoj nenio trafis nin tiom kiom la bela verko kiu estas farita de vi tie-ĉi.

„Kio koncernas la „Waldschule,, (Arbara Lernejo) en Charlottenburg, ĝi tute ne povas esti komparata kiun tiu ĉi modela organizaĵo. Tiu ĉi liberaera lernejo multe superpasas tiun de Charlottenburg. Je la nuna momento oni okupas sin en Berlin pri projektoj de novaj arbaraj lernejoj: mi prezentos mian raporton al la komisiono, konsilos kaj instigos ĝin preni informojn tie ĉi, fari viziton tie ĉi, organizi la novajn lernejojn laŭ la koncepto kaj la spirito kiuj regas tie-ĉi..

Al kolego Jacobs, kiu ree havis la feliĉan iniciativon k: nigi niajn klopodojn al eksterlandaj samfakuloj, denove koran dankon.

Dum ni kondukis la grupon da knabinoj al Blankenberghe, kolego Jacobs denove servis kiel gvidanto kaj akompanis al nia kolonio, i. a. sinjoro Albin Neŭzil, la inter la instruistaro ne nekonata lernejestro el Olomouc-Neredin, Ĉeĥoslovakujo, la propagandisto de la t. n. stampmetodo en la desegnado, — kiu postlasis por ni sian libron kun dediĉo kiel esprimon de estimo. H. S.

(Tradukita el la oficiala organo de "Diesterweg's Hulpkas).

* * *

Antaŭ al forlasi la lernejan kolonion la vizitantoj faris monkollekton, kiu raportis 152 fr. kaj 40 fr., per kiu sumo ili fondis liron. Ĝi havas la n^om 1870 kaj eterne memorigos neforgeseblan viziton per la jena surskribo (en Esperanto): Kelkaj partoprenantoj en la XXa Universala Kongreso de Esperanto, Antwerpen, Aŭgusto 1928.

Esperanto ĉe neesperantaj organizajaj.

S^{ro} J. Jacobs, prezidanto de A. P. P. K. estis petita reprezenti ĉe la XXa kongreso de Esperanto la "Ligue Internationale pour l'Education nouvelle.. (Internacia Ligo por Nova Edukado) kaj la "Uitvoerend Comité der Wereldtentoonstelling, Antwerpen, 1930 (Plenumanta Komitato de la Universala Ekspozicio, Antwerpen, 1930).

La unua organizaĵo petis lin fari la jenan komunikon :

"La Internacia Ligo por Nova Edukado, okaze de sia Kongreso de Locarno, en 1927, decidis per akklamado kaj laŭ la propono de sia Prezidanto, s^{ro} Pierre Bovet, alpreni Esperanton kiel helplingvon je sia kongreso en Danujo en 1929.

Kun granda ĝojo ni sciigas al la esperantistoj de la tuta mondo tiun novan venkon de la helplingvo. Je ĉiu kongreso la nombro de la aliĝantoj al la Nova Edukado estas pli granda. La kvar unuaj kongresoj kalkulis respektive 100, 300, 500 kaj 1200 anojn. Estas neniu dubo ke la 5a preterpasos ankoraŭ tiujn nombrojn. Tio estas ĉar pli kaj pli multnombraj estas la gepatroj, la geinstruistoj kaj la aŭtoritatuloj kiuj konvinkiĝas ke nenia renovigo de la mondo povas okazi ne renovigante la edukadon. La sano fizika kaj morala de la infanoj ebligas la sanon fizikan kaj moralan de la tuta mondo. Ke Esperanto povu kunhelpi por unuigi la virojn kaj la virinojn kiuj konscias tiun grandan veron kaj ebligi al ili, uzante la saman lingvon, doni la mortigan baton por la disfaliĝo de la Babel'a turo.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn, al kiuj estas kara la bono de la infanaro, ĉeesti la kongreson en 1929 de la Internacia Ligo por Nova Edukado,...

* * *

La dua organizaĵo petis la peradon de s^{ro} J. Jacobs por transdoni al la XXa la sekvantan saluton :

"La Plenumanta Komitato de la Universala Ekspozicio, Antwerpen, 1930, deziras prezenti al la sinjoro Prezidanto kaj al la anoj de la XXa Universala Kon-

greso de Esperanto, la esprimon de sia plej kora simpatio kaj sincera estimo pri iliaj klopodoj.

Ili ĝojas pri la rimarkinda sukceso de ilia Kongreso kaj esprimas la deziron ke la laboroj same brile sukcesu.

Ili speciale salutas la multnombrajn partoprenantojn el la eksterlando kaj en ili iliajn respektivajn landojn, kiujn ili certe esperas vidi reprezentitaj en la grandioza Universala Ekspozicio, kiun ili preparas por tiu jaro, okaze de la Centjara Datreveno de la Sendependeco de la Lando, de la inaŭguro de la grandegaj novaj haveninstalaĵoj de Antwerpen kaj por la favorado de la internacia ekonomio, de la interfratiĝo kaj de la solidareco inter la popoloj...

Festo en Hoboken.

La 29an de Septembro estas tago kiun la Hoboken'aj Esperantistoj neniam forgesos.

La unua festo de nia grupo estis plensukcesa. Jam de la posttagmezo la Esp.ka flago flirtis en la vento sur la tegmento de nia sidejo.

La festo estis organizita pro la unua datreveno de la starigo de nia grupo; samtempe ni honorigis la lernintojn de nia kurso per diplomoj.

Nia kunvenejo estis metamorfozita en festsalonon. Ĉirkaŭ la oka la invititoj alvenis. Inter ili ni rimarkis delegitojn de A.P.P.K., Suda Lumo, Rekta Vojo, Diamantistoj, Geintruistoj, Flandrema Grupo, Antverpena Polica Grupo, kaj diversajn alilandanojn.

La Grupo Nia Ideo senkulpigis sin letere, kiel ankaŭ S^{ro} Bastiaans, komunuma konsilanto. Post kelkaj momentoj la malgranda salono estis tute plena je intersemuloj.

Nia prezidanto salutis per kelkaj vortoj la ĉeestantojn.

Poste la festprogramo komenciĝis per la kantado de la Espero. Dum kelka tempo la kantoj kaj deklamadoj sin sekvis.

Kiam la atestoj estis disdonitaj S^{ro} Jacobs, la sindonema kaj simpatia prezidanto de A.P.P.K., diris kelkajn trafajn vortojn al la

laŭreatoj; li instigis ilin daŭrigi la studadon de nia kara lingvo ĝis la fina venko. Li estis ege aplaŭdita precipe kiam li ĉiujn alvokis neniam ĉesi la laboradon, sed daŭrigi la propagandon por Esperanto.

Tiam nia Prezidanto parolis pri la laboro de nia grupo dum ĝia ekzistado.

La plej juna lernanto transdonis je la nomo de la sekvintoj de la kurso belan donacon al la gvidanto, nia Prezidanto, kiu malaperis preskaŭ sub la floroj.

Fine oni ankoraŭ amuziĝis dum iom da tempo. Unu post la alia forlasis nin kun bona impresio pri nia grupo.

Ni esperu ke ni ankoraŭ povu ĝui multajn tiajn festojn.

Benedikto Somers.

Internacia Esperanto Muzeo. - Wien. (Daŭrigo)

La nuntempa inventario je presverkoj sumas pli ol 1.200.000, krome 30.000 manuskriptojn kaj la kolekto de portretoj pli ol 100.000 pecojn.

Ĝen. dir. prof. Bick sciigis min, ke:

1. „N.-Bibl.“ tre volonte kaj laŭpove subtenas la klopodojn koncerne la starigon de internacia E.-muzeo kaj de tia biblioteko en Wien;
2. li intencas disponigi al ni taŭgajn ejojn en la konstruaĵo de N.-Bibl. ĉe Josefsplatz, kiuj iĝas liberaj per translokiĝo de la manuskript-kolekto en ĉambrojn de la nova kastelo, kiuj estas jam disponigitaj por tiu celo, sed devos esti adaptataj;
3. li provizore disponigas al ni unu ĉambron en la unua etaĝo por materialdepono;
4. la aligo de IEM, al „N.-B.“ ebligos per aparta kontrakto kiel tio okazis je la aliaj aligitaj kolektoj; kondiĉoj estas:
 - a) la materialo restos propraĵo de la societo IEMW., sed estas transdonota kiel pruntaĵo por la daŭro de l'ekzisto de „N.-B.“ kiel publika instituto;
 - b) la materialo estas traktota koncerne

enkatalogigon. konservadon kaj alirebligon same kiel la propraj havaĵoj de „National-Bibliothek“.

Ke Internacia Esperanto-Muzeo havos sian sidejon ĉe la plej distingita placo de Wien, en la eksimperiestra kastelo, en „Nationalbibliothek“, kiun ĉiu alilanda gasto vizitas kiel vidindaĵon; ke ĝi estos aranĝata en tiu nepre scienca kadro, ĉio ĉi estas jam per si mem nesuperebla propagando por nia lingvo. Tio ĉi konvinkos eĉ la plej skeptikemajn sciencistojn.

Per tio ankoraŭ la du ĉefaj problemoj de la tuta aranĝo estas solvitaj. Unue la financa: Ni ricevos la salonegojn (tiom noblajn ni eĉ por multa mono ne estus povintaj havigi al ni), ne bezonos zorgi pri hejto, lumigado, telefono, ktp. Samtempe ni havos la avantaĝon, ke en nian kolekton aŭtomate transiros el la riĉa verkaro de „Nationalbibliothek“ la volumoj koncernantaj la mondlingvan problemon.

La dua estis tiu de sufiĉa garantio.

Pli grandan certecon pri restigo, taŭga traktado kaj konservado ne niu instituto povus doni ol „N.-B.“ — Konsekvence la ĝen.-dir. de „N.-B.“, kort.-kons., univ.-prof. d-ro J. Bick akceptis nian inviton eniri „I.H.K.“.

Ni opiniis memkomprenebla ĵo partoprenigi en tiu internacia afero ankaŭ oficialajn reprezentantojn de la diversaj registaroj en Wien.

Mi ĝis nun nur havis la tempon, viziti kelkajn.

Akceptis ĝis nun la ambasadoroj kaj rajtigataj ministroj.

Grafo Hugo Lerchenfeld (Germana Regno)
Le Ghait (Belga Reĝlando)
Morie Ohno (Japana Imperio).

Neniu dubos, ke per tio IEMW. nerekte helpas ankaŭ la movadon en la koncernaj landoj; dependas nur de l' eluzo!

La karaktero de IEM. unuflanke kaj la nuna enkadrigo al ŝtata instituto aliflanke klarigas sufiĉe, ke la leĝe postulita societo IEMW., kiu zorgu pri plua evoluo de la muzeo, ne povas esti submetita al iu E.-organizaĵo. Impona

kresko kaj laŭebla kompleteco de la muzeo respegulos la gravecon de E. al ĉiuj landoj. Pro tiu influo ĉiaj organizaĵoj post la kreo de nun sufiĉa bazo komprenos sian taskon kaj ne plu retenos sian materialon.

Sed materialo sola ne sufiĉas. Malgraŭ la malavara subteno ŝtata ni rapide povos atingi imponan staton nur, se ankaŭ la societo IEMW. disponigos sufiĉan monon por korespondado ktp.

Tial aliĝu ĉiuj kun la poĵara kotizo bagatela je almenaŭ s. v. fr. 1.20. por kiu vi ricevos membrokarton.

Skribu pri IEMW. en viaj Esp. kaj naciaj gazetoj, sendu al ni eltranĉojn.

Ni opinias, plej bone esti efektivigintaj la deziron de nia ICK.-prez. Privat. esprimita en la festparolado de nia XVIa: „... Malfermiĝas por Wien vasta kampo en la internacia vivo... je ĉiu paŝo staras imponaj palacoj en tiel granda nombro, ke la ideo venas, kial kelkaj el ili ne utilis jam kiel sidejoj de novaj tutmondaj institucioj!“

Ni ĝoju tutkore, ke fine la ideo de niaj atestimataj enimentuloj Cart kaj Sebert pri kreo de IEM. realiĝis nun en Wien. Steiner, prez.

aŭ eĉ vundiĝo de la ensidantoj. Ĉiu fakulo povas tion imagi.

Mia celo estas alvoki la esperantistajn aŭtomobilistojn kaj motociklistojn, memkondukantojn, ŝoforojn kaj aliajn personojn. kiuj iel rilatas al aŭto-aferoj, ke ili unuiĝu por progresigi Esperanton en la internacia aŭtomobilistaro. Pro la rapidege kreskanta internacia trafiko de motorveturiloj mi supozas, ke post nelonge kelkaj post kelkaj naciaj aŭtoklubo ktp. ekkonos la mondlingvan aferon kiel sian propran kaj mem postulos kaj helpas la ĝeneralan enkondukon de Esperanto. La franca "Touring Club." jam donis antaŭ kelkaj jaroj rezolucion por Esperanto. Sed kie restas la aliaj kluboj, kaj kie restas la agadoj post la rezolucio?

Jen nia ĉefa laborkampo. Ĝi ne bezonas resti la sola. Laŭ la sistemo de nia organizo ni povus havi ankoraŭ aliajn okazojn por progresigi Esperanton kaj la modernan trafikon. Sed tio rezultigu el estontaj intertraktoj.

Ĉiokaze mi petas miajn gesamsportanojn, ke ili bonvolu sciigi min, ĉu mia propono trovis ilian aplaŭdon, kaj dankas jam antaŭe por eventualaj proponoj. Poste mi sendus rekte al ili novajn informojn.

Karl Knoll, Zittau i. Sa. (Germanujo)
Theodor-Körner-Allee 11,1

Aŭtomobilistoj kaj motociklistoj!

En la granda nombro da internaciaj komunikiloj troviĝas kiel unu el la plej gravaj la aŭtomobilo kaj ĝia malgranda frato, la motociklo. Rapideco kiel tiu de fervoja trajno ebligas, ke oni povas traveturi vastegajn regionojn de sia lando dum mallonga tempo. Post kelkaj horoj oni povas esti profunde en rajbara lando, kie la homoj parolas tute alian lingvon. Ni aŭtomobilistoj tiam sentas plej akre la lingvajn diferencojn, kaj kiel esperantisto mi ĉiam bedaŭras, ke nia helplingvo ne estas jam posedaĵo de la tutaj popoloj.

Mi ne volas longe skribi pri la embarasoj, kiujn kaŭzas neinformiteco pri vojo-direkto, difekto aŭ akcidento de la veturilo

Verkoj de Zamenhof.

- daŭrigo)
- „Pri la Germanaj Vortaroj.“ Artikolo. En „Germana Esperantisto.“ 1907. p. 57.
 - „Rimarkigo pri Prezento de „Ifigenio.“ Noto. En „Germana Esperantisto.“ 1908. p. 38.
 - „Al Fraŭlino Hedwig Reicher.“ Poemo de Heine. (el „Buch der Lieder“). En „La Revuo“ III. 1908. p. 145-147.
 - „Danko“ okaze de la kvindeka datreveno de naskiĝo. Gazeta deklaro de la 20/XII/1909. En „La Revuo“ IV. 1910. p. 205.
 - „Pri Mia Rilato al la Fermo Hachette.“ Komuniko. En „Oficiala Gazeto Esperantista“ III. 1911. p. 251-254.

„Propono pri la Organizo de Niaj Kongresoj.” Artikolo. En „Oficiala Gazeto Esperantista” III, 1911. p. 281-282.

„Letero pri Rajtigitaj Delegitoj 'aj pri la Centra Organizo.” En „Pola Esperantisto,” junio, 1912. Represita en „Oficiala Gazeto Esperantista” V, 1912. p. 100-106.

„Parolado super la tombo de Carlo Bourlet.” En „La Revuo.” VIII, 1913. p. 4-5.

„Pluvo.” Poemo. En „The British Esperantist.” 1914. p. 239.

„Anonco pri Vendo de Aŭtoraj Rajtoj.” En „The British Esperantist.” 1915. p. 201.

LETEROJ

„Letero pri Reveno el Mandjurujo. En „Lingvo Internacia... 1905. p. 68

„Danka Letero.. al la franca ministro de la publika instruado. okaze de akcepto en Honoran Legion. En „Esperanto... eldonita de Lambert, N-ro 14. 1905.

„Letero al Schneeberger pri la Okazonta Ĝeneva Kongreso... En „Lingvo Internacia... 1905 p. 493.

„Klarigo pri la Centra Oficejo... Cirkulero. 1/III/1906. En „Esperantista Dokumentaro XI... p. 9-10.

„Cirkulera Letero... dissendita pere de la firmo Stephens' Inks. En „The British Esperantist... 1906. p. 62.

„Letero al D-ro Couturat... 13/I/1907. Pri la „Delegacio.” En „Esperanto.” 1921. p. 44.

„Cirkulera Letero al Ĉiuj Esperantistoj.” 18/I/1908. Pri la „Delegacio.” En „Lingvo Internacia”. 1908. p. 73-77.

Una Letero al „Voĉo de Kuracistoj.” En „Voĉo de Kuracistoj” I. 1908. p. 1.

Dua Letero al „Voĉo de Kuracistoj.” En „Voĉo de Kuracistoj.” I. 1908. p. 18.

„Letero al Franca Esperantisto” 24/IV/1908. Pri la Lingva Komitato. En „Germana Esperantisto.” 1908. p. 78.

Letero al Sentis de 22/XII/1908. En Esperanta Evoluo.” 1911. p. 2-3.

„La Deveno de la Verda Stelo.” Letero. En „The British Esperantisto,” 1912. p. 34.

Letero al „La Ondo.” 10/IX/1913. Pri la „Delegacio”. En „La Ondo de Esperanto,” 1913. p. 170-171, 173-174.

PAROLADOJ

Parolado ĉe la I-a Kongreso, 1905.

Parolado ĉe la II-a Kongreso, 1906.

Parolado ĉe la III-a Kongreso, 1907.

Parolado en la „Guildhall” de Londono, 1907.

Parolado ĉe la IV-a Kongreso, 1908.

Parolado ĉe la V-a Kongreso, 1909.

Parolado en Peterburgo ĉe la unua rusa Esperanto-Kongreso. En „The British Esperantist,” 1910. p. 168.

Parolado pri U. E. A. en Barcelono. En „Esperanto.” eldonita de Hodler, numero (62) de la 20/IX/1909.

Parolado ĉe la VI-a Kongreso, 1910.

Parolado ĉe la VII-a Kongreso, 1911.

Parolado ĉe la VIII-a Kongreso, 1912.

VORTARO

Malgranda vortaro internacia-rusa (D-ro Esperanto.) (Internacio-narnij-ruskij slovarj). Eld. 1889, 2+8 p.

Malgranda vortaro internacia-pola.

Malgranda vortaro internacia-franca.

Malgranda vortaro internacia-germana.

Malgranda vortaro internacia-angla. [Dr. Esperanto's International-english Vocabulary] Eld. 1889. Varsovio. 8 p.+2 fol.

Plena vortaro rusa-internacia (D-ro Esp.) [Polnij Slovarj Esperantskago jazika. Ĉast rusko-Esperantskaja.] Eld. 1889. Varsovio 232 p. (Stereotipe reeld. 1910).

Meza vortaro internacia-germana (D-ro Esp.) [Wörterbuch der Internationalen Esperantosprache. International-deutscher Teil.] Eld. 1889, Varsovio, 73 p.

Universala vortaro de la lingvo internacia. Eld. 1894, en Varsovio.

Granda Vortaro Germana Esperanta. Eld. 1894 en Odeso. 16 p.

Wörterbuch Esperanto-Deutsch de Zamenhof/Jürgensen. Eld. ĉe Möller & Borel. (Unua eldono 220 p. — Dua eld. 248 p.)
"Wörterbuch Deutsch - Esperanto" de Zamenhof/Jürgensen. Eld. ĉe Möller & Borel. (Una eld. 235 p.—Dua 278 p.)
Taschenwörterbuch Deutsch - Esperanto und Esperanto-Deutsch. Eld. 1907, ĉe Möller & Borel. 137 p.
Esperanto jezyk Miedzynarodowy. Czesĉ II. Słownik Esperanto-polski i polsko-Esp. Eld. 1907 de M. Arct. Varsovio 58+6+16 p.
Plena Vortaro Esperanto-Rusa. [Polnĵ Słovariĵmeĵdunarodnago jazika Esperanto Ĉostj Esperantsko-russkaja]. Eld. 1909 de librejo „Esperanto” en Moskvo, 151 p.

Diversaj informoj.

Ge-roj De Waegenaere translokiĝis. Ili nun loĝas 34, Constant Neutjensstrato, Schooten. A. P. P. K. sincere bedaŭras la foriron de tiuj-ĉi fervoraj geesperantistoj; aliflanke ni ne estu tro egoistaj kaj ni deziras al ili ankoraŭ multjaran trankvilan kaj feliĉan vivadon. Tamen ni ne miru se baldaŭ ni ricevos la informon pri la starigo de la "Schooten'a Grupo Esperantista..."

Pro la foriro de s^{ro} De Waegenaere, la franca lernolibro "Cours pratique,, de nun estas havebla ĉe s^{ro} G. Janssens, Vinĉottestrato, 76, Borgerhout, tel. 337.12.

S^{ro} J. Karnas, prezidanto de "La Rekta Vojo" translokiĝis kaj loĝas nun Brussel-schestrato, Wilryck-Antwerpen.

De nun la sidejo de "La Rekta Vojo,, estas en kafejo "Amical", Statiestrato,

Gefianĉiĝo.

La 23-an de septembro fraŭlino Maria Lodema fianĉiniĝis je sinjoro John Monstrey. Ambaŭ estas anoj de "La Rekta Vojo... A.P.P.K. prezentas al ili siajn plej sincerajn gratulojn.

—o—

Geedziĝo.

La 30-an de oktobro geedziĝis sinjoro Schraeyen kun f^{ino} Deleckker, ambaŭ anoj de Hobokenaj Esperantistoj. Plej korajn bondezirojn ni prezentas al la juna paro.

A.P.P.K.

—o—

Honoriga ofico.

En kunsido de la 26-a de novembro de la Antwerpen'a Urba Konsilantaro s^{ro} G. Zwaenepoel, la simpatia sekretario de la Polica Grupo Esperantisto, estis nomita helpa polickomisario.

Plej korajn gratulojn!

A.P.P.K.

Ĉu vi jam scias ke ano de A. P. P. K. liveras bonegajn belgajn karbojn?

Demandu la prezojn.

J. BOVOY

Minderbroedersrui, 64, Antwerpen.

POR VIAJ PRESAĴOJ

turnu vin al la presejo

Sele & Van der Mast

Prinsesstraat, 11. ANTWERPEN.

Presejo SELE & VAN DER MAST.
Prinsesstr. 11 — Antwerpen.